


# kontakto

*Alternativaj*



**viv-stiloj**

**trimonata revuo de tejo**  
tutmonda esperantista junulara organizo

**numero 68 (1980:4)**

# kontakto

## REDAKTOROJ:

Dario Besseghini, Karl Pov

## KONSTANTAJ KUNLABORANTOJ:

Csaba Finta, Jugoslavio; Miguel Gutierrez Adúriz, Marteno Ruiz Altaba, Hispanio; Michael Lennartz, Germana DR; Jan Koszmaluk, Pollando; Anna Brennan, Nederlando.

**ADRESO DE LA REDAKCIO:** 'Kontakto', Dario Besseghini, Casella Postale 210, I-56100 Pisa, Italio.

**ADRESO DE LA ADMINISTREJO:** Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel. (010) 36 15 39; pĉk 37 89 64 de ĝiroficejo Den Haag.

# enhavo

Enkonduko . . . . .	kp	2
En la fokuso de la alternativo . . . . .	Elisabeth Schwarzer	3
Doina masaĝado . . . . .	Normand Fleury	4
La amanaoj: Izoliĝo kiel alternativo . . . . .	Karl Pov	5
Oneida: La utopia alternativo . . . . .	Ĝim-Kuŝino	7
Ĉu moderna aŭ popola medicino? . . . . .	Daniela Deneva	8
Pri alternativaj evolu-stiloj . . . . .	Probal Daŝgupto	10
Imunoterapio: Alternativa rimedo kontraŭ kancero . . . . .	Mieko Daibuzono	12
Laŭlekta tradukado (Dialektoj kaj aliaj lektoj en la internacia lingvo, parto kvar) . . . . .	Renato Corsetti	13
Tentaklo (reagoj al n-ro 66: Komputoroj) . . . . .		16
La Terura Tentaklo! (parto kvar) . . . . .		17
Libera tribuno (leteroj de legantoj) . . . . .		19

# enkonduko

Ne, ne, ne — ne malŝparu vian tempon ĉi tie! Rigardu unue al nia dorskovrilo, kaj poste fosu en la koverton, en kiu ĉi tiu numero alvenis, ĝis vi trovos la aliĝilon al la 37a Internacia Junulara Kongreso en belega (vidu rekomendon de Marko Vedelo, p. 19) Oaxtepec. Plenigu ĝin. Sendu ĝin. Sendu ankaŭ tiun ankoraŭ malaltan kotizon. Ĉu vi finis? Bone. Ne serĉu alternativon al la IJK!

Pri alternativoj tamen temas ĉi tiu numero. Alternativo al tio, kio estas kutima, al tio, kion vi verŝajne jam konas. Surprize grandan intereson montris niaj kunlaborantoj pri alternativaj manieroj teni la korpon en ordo. Unu artikolo donas al ni superrigardon pri la popola medicino. Alia informas pri nova armilo en la batalo kontraŭ kancero. Tria, tute mallonga, konsilas pri bonfartiga terapio por tiu traŭma periodo, kiun oni nomas 'ellitiĝo'.

Tuj kontraŭ ĉi tiu paĝo vi povas legi pri alternativumado en Germanio, kie okazas ĉiujare la fama Internacia Seminario (IS) de Germana Esperanto-Junularo, kiu per sia elekto de la temo 'Alternativaj vivstiloj' instigis la produktadon de ĉi tiu numero. (Ĝia mendo por kvanto da ekzempleroj estas bonvena ekonomia helpo.)

## TABELO DE ABONOJ KAJ KOTIZOJ 1981

La ĉi-sekva tabelo montras la tarifojn por abono kaj membreco en TEJO por kelkaj landoj. Se vi loĝas en alia lando, petu de via landa peranto aŭ de la administrejo de *Kontakto* informojn pri la vialandaj tarifoj. La tarifojn influas la prez-nivelo en la koncerna lando.

	Brazilo (kruz.)	Francio (frankoj)	FRGerm. (markoj)	Japanio (enoj)	Nederl. (gld.)	Usono (dol.)
Abono 390	40,50	18,00	1800	19,50*	10,20	
MA-K 1300	135,00	60,00	6000	62,50	34,00	
MJ-K 520	54,00	24,00	2400	25,00	13,60	
Patr. 780	81,00	36,00	3600	37,50	20,40	

MA-K: por junaj esperantistoj ĝis inkl. 25-jaraj. Inkluzivas la Jarlibron de UEA kaj la revuojn *Kontakto* kaj *Esperanto*. MJ-K: kiel MA-K sed sen la revuo *Esperanto*. Patrono: finance subtenas TEJO-n. Inkluzivas la revuojn *Kontakto* kaj *Koncize*.

\* La nederlanda abonkotizo inkluzivas la imposton 4%.

ANONCTARIFO: 120 gld. por tuta paĝo; 70 gld. por duona paĝo; 40 gld. por kvarona paĝo. Anoncetoj (sen kadro) por 0,25 gld. por ĉiu vorto (aŭ po unu internacia respondkupono por tri vortoj).

De du eŭrope loĝantaj usonanoj venas priskriboj de usonaj alternativaj socioj, el kiuj unu bonfartadas jam ducent jarojn, sed la alia iom rapide mortis. Tiun lastan artikolon ilustras la aŭtoro de nia kovrilo (maldorsa), Huibert den Draak, paca batalanto konskripciita de la nederlanda armeo en la Centran Oficejon de TEJO/UEA. Ni esperas plu ekspluati liajn desegnaj kaj aliajn talentojn en estontaj numeroj.

Pasintjare, same pro instigo de IS, *Kontakto* esploris la Trian Mondon. Tiun temon ligas al la ĉi-jara tre pensiga eseo pri alternativaj evolustiloj.


Se vi malsatas je alternativoj al tiom da alternativaĵoj, eĉ al vi ne mankas taŭga furaĝo. Aperas du konkludoj: unu, iom longa, al la serio pri lektoj en Esperanto — kaj dua, en kiu finfine malkaŝiĝas la mistero de la Terura Tentaklo! Al la diversaj alvenintaj divenoj la ne malpli mistera aŭtoro respondis nur per kruele sarkasma ridaĉo. He ve, la premio restos nealjuĝita!

Nia numero (66) pri komputiloj altiris lavangon da reagoj, kiu aperas parte en nia (ne tiel terura) Tentaklo, parte en la Libera Tribuno. Respondintoj pri muziko (n-ro 65) bonvolu pardoni, ke la Tentaklo ilin pretersaltas ĝis (verŝajne) la venonta numero.


Vi jam reabonis, ĉu ne?

kp

# En la fokuso de la alternativo



de Elisabeth Schwarzer, Germanio (Berlino)



**Tipaj loĝkomunumanoj: la individuoj iom malsimilas inter si, sed ilin unuigas malakcepto de la valorosistemo de la ĉirkaŭa socio.**

Sen spertoj pri la vasta mondo mi ne povis konjekti, kio karakterizos mian vivon post mia lerneja junaĝo: mi ne konis la urbon al kiu mi strebis. Post iom da tempo mi eĉ kuraĝis antaŭeniri al la plej vera centro de ĉio (kaj nenio). Fariĝis mi civitanino de Kreuzberg, parto de la tria plej granda turka urbo en la mondo.

Bedaŭrinde mi ne regas tiun lingvon de lando en kiu mi ne naskiĝis. Sekve mi ne kapblas respondi la bonvenigon de mia turka fruktovendisto. Krome, unu tagon min malmcertigis kaj malgajigis fremdlanda knabineto kiu rigardis min kaj kuraĝis demandi: ĉu vi estas turka aŭ germana?

La origina kaŭzo kiu alpelis min estas studado: la institucio havas unikan nomon en la mondo — *Libera Universitato*. Almenaŭ la sistemo de studado kiun ni sekvas havas la bonintencan nomon *alternativa kurssistemo*. Mia ĉefscivolemo direktiĝas al ekzotikaj landoj kaj ties enloĝantaro. Principe tia interesiĝo ne enhavas ion malmoralan, sed niaj studentaj amasoj emas intermiksi siajn nerealitajn revojn, sciencan kaj faktojn. Ni serĉadas per tio la alternativon — al vivo en ora kaĝo. Ne nur mi: ankaŭ 999 pliaj studentoj sopiras je etnologiaj studoj en nia urbo. En malinvita kelo ni eĉ instalas 'orkidean kafejon'. La adjektivon 'orkidea' oni uzas ĉe ni por tiuj studobjektoj — ekz. islamaj studoj, arthistorio, ĉinologio

— kiuj estas belaj kaj plezurdonaj kiel orkideo, kaj kiujn oni studas pro la valoro de la fako mem, ne por lanĉi karieron aŭ 'enpaŝi realan vivon'.

Hejme mi loĝas en telefonbudo (ne kredis kun nevidebla surskribo 'nacia-internacia'. Tiujn mensogojn inventis gekamaradoj, kiuj intencis ĉagreneti min. Tamen ni ne konstruis nian loĝejon. Ĝi apartenas al preskaŭ centjaraĝa granddomo kun agrabletaj ĉambregoj kaj malagrabletaj ĉambregoj.

Verdire temas pri la tera paradizo de vera loĝkomunumo (germane "Wohngemeinschaft") — mirakla nocio. Tio estas ĉiutagaĝo en nia urbo. Nur unu premiso estas postulata: ĝi devas esti *nedogmece*. Diablotoj scias, kion signifas tio. Laŭ mia unua impreso temas pri unuapaŝa forigo de la ĉefa karakterizaĵo de la sesdekaj urbobataloj, kiam regis politiko ĉie ajn inter la junularo.

Nun konkrete ni volas plialtigi la vivokvaliton en nia propra vivomedio. Tio inkluzivas la konstantan lukton kontraŭ atomcentraloj, kontraŭ ovoĝoj el 'kokinaj fabrikoj', kontraŭ burokratie regata vivo kaj aliaj grandpekoj de la moderna civilizo. Valoras nun la lukto por membakita pano, por psikaj helpgrupoj, por violkoloraj pantalon-egoj kaj similaj revoj.

En la fondepoko de la loĝkomunumoj, laŭ miaj raraj informoj, homoj kolektiĝis loĝ-cele ĉar tiamaniere prezentiĝis alternativo (tiam la vorto ne estis laŭmoda) al la tradiciaj familiaj kaj para vivstiloj. Nun ĉefas alia impulso ofte aŭdata: 'Mi volas fari ion kune kun aliaj homoj.' Mi konscias, ke en tio enestas ĝentileco — kaj manko de starpunktoj (pardonu, ĵus vi legis neveron).

Kreuzberg-anoj bezonas 'scenon'. Necesas koni sian gastejon aŭ kafejon. Ne supozu senfinan noktandiboĉadon: mi nur klopodas informi pri la renkontejoj. En la gastejo en nia propra domo neniam ni estis, ĉar tio ne decas: alternativulo tien ne iras. (Jes, jam ni alfrontas etikajn valorojn.) En nia mallonga strato, sensaciaj estas, kontraŭe, germannoma gastejo, kiun posedas ekskluzive palestinanoj, kaj la okupaciata domo (numero 3).

Jen alia ĉiutagaĝo — la okupaciataj domoj. La loĝejoj oni ne plu ludonas; la posedantoj atendas iun nekonatan tagon nenion farante. Kaj aliflanke ĉiuspecaj amasoj sopiras je loĝejo en nia urbo. Kuraĝuloj kaj laboremuloj kutimas okupacii tiajn domojn por ilin renovigi kaj enloĝi. La domon en nia strato ŝtatinstancoj jam toleras de pli ol duona jaro. La postulon de la okupaciintoj pri lukontrakto kaj financa subteno ankoraŭ neniu plenumis.

En la sfero de informado nia urbo same avangardas (aŭ simple akaparais) la alternativon. Pasintjare dum printempo ekaperis du novaj ĵurnaloj: unu estis la praktika

realigo de temero de la 'Tunix-kongreso', okazinta antaŭ pluraj jaroj en la sama urbo. *Tunix* signifas: faru nenion. Verŝajne por tion kaŝi la ĵurnalo havas la neekzotikan nomon *Tageszeitung* (Taga Gazeto). La dua, konata eĉ al kelkaj membroj de Germana Esperanto-Junularo, elektis simile 'fantazian' nomon: *Die Neue* (La Nova). Laŭ mi la produktantoj ankoraŭ proprasparte memoras pli batalemajn tempojn. Preskaŭ senkonkurence *Tageszeitung* estas la 'scena' gazeto. Pardonu, ke mi ĉi tie haltigas la prezenton: mi studas ankaŭ publicistikon kaj verŝajne por daŭrigi bezonus tro da vortoj.


Laŭ miaj raraj informoj en nia urbo ekzistas la sola alternativa partio en la ĉirkaŭaĵo. Okulfrapas jam la nomo 'Alternative Liste' (alternativa listo). La ĉefa slogano kaj la programo celas demokration (kiu el ni jam vidis tiun fantomon?) kaj mediprotektadon. Ĝia aparta insigno estas la erinaco, la afabla besteto. Ĝi prezentis unuafoje



kandidatojn por la urba parlamento komence de la pasinta jaro, kaj verdire en kelkaj urbaj distriktoj ili estis elektitaj en sufiĉa kvanto — evidente, ke tio okazis ankaŭ en Kreuzberg.

Iliaj klopodoj direktiĝas unuavice al lokaj problemoj: rilate la loĝproblemon ili pledas por sufiĉe da loĝloko por ĉiu kaj socie konvenaj luprezoj.

Eble vi opinias, ke mi prezentas la alternativulojn en stranga maniero. Vi pravas, sed rigardu mian situacion: mi estas ĉirkaŭita de la tentakloj de la alternativo. Mian vivon minacas grandparte formi la alternativo: ĝi tendencas al ekskluziveco. Vi ne povas imagi kiom min trankviligis sciigo pri nova libro de berlinano, kiu kuraĝas demandi: 'Ĉu ŝanĝi ĉion? La alternativuloj al la alternativa movado'.



Ne estas tute certe, ĉu la granda 'A' reprezentas la vorton 'Alternativo'.



## Doina masaĝado

de Normand Fleury, Kanado


Ĉi tiu artikolo nur supraĵe enkondukas la doinan ('dō-in') masaĝon. Se ĝin akompanas bona nutrado, tiu masaĝo metodo liveras sanigan energion.

Analizu vin kiam vi vekigaĝas! Ĉu vi tuj poste ellitiĝas, vestiĝas kaj iras matenmanĝi? Ĉu jes? Vi forĝesis ion! Vi forĝesis vekigi fizike. Ĉu vi iam vidis, kiel bestoj vekigaĝas, kiel katoj malstreĉas sin? Do bone. Vi bezonus nur kvin minutojn matene.

Unue, spiru profunde por plioksigenizi vian sangon. Tiu oksigenizita sango fluos al via cerbo kaj plivekos ĝin. Nun, varmigu viajn manojn per kunfrotado. Ili estas la

solaj masaĝiloj en doino. Poste, masaĝu kaj frotu viajn brakojn, kolon, kapon. Rotaciigu la kapon por malfermi la spirvojojn kaj plibonigi la cirkuladon al la kapo. Nun, masaĝu viajn koksojn, bruston, gambojn ktp. Se vi havas iom da tempo, brosadu, en malvarma akvo, viajn piedojn. Ili gravas. La ĉi-suba desegnaĵo montras kie la organrespondaj punktoj troviĝas sur la dekstra piedo. Per rotaciaj fingropremoj sur ĉi tiuj punktoj, vi vigligos la respondan organon. Punktoj ekzistas ne nur sur la piedoj sed ĉie sur la korpo.

Eble tio ŝajnas tro simpla: mi celis trakti nur la facile aplikeblajn metodojn.



La plando: centre grava korp parto en la doina sistemo de masaĝado.

# La amananoj

## Izoliĝo kiel alternativo



de Karl Pov, Nederlando

Inter ĉi tiuj kamparanoj regas la tradicio. La viroj laboras en la kampo, la virinoj en la domo. Aŭtomobilojn ili ne uzas, nek multajn modernajn agrikulturajn maŝinojn. Modernajn distraĵojn ili apenaŭ konas, ĝuante nek televidon nek kinon nek eĉ radion. Ili preferas ne fotiĝi.

Povas esti, ke ĉi tiu priskribo aplikiĝas al granda parto de la terloĝantaro, certe al granda parto de la Tria Mondo. Sed ĉi tiuj troviĝas ne en Azio aŭ Afriko, sed en Ameriko — Nord-Ameriko — la kapitalisma-teĥnologia Babilono mem: Usono. Ilin oni nomas la amananoj.

### Kiel estiĝis la amanismo

La amananoj originis el skismo interne de la eŭropa anabaptisma movado. La anabaptistoj mem fariĝis protestantoj ene de la protestanta movado, malaprobante la tiam fortajn ligojn inter registaro kaj eklezio kaj la sekvan moralan subtenadon fare de ĉiu eklezio al militoj, kiuj celis i.a. defendi kaj disvastigi la 'ĝustan' kredon. Tio en si mem venigis pezajn persekutadojn sur la anabaptistojn.

Pli esenca afero el la vidpunkto de la anabaptistoj estis ilia kontraŭstaro al baptado de infanoj. Por ili, baptiĝi signifis sin konscie kaj plenvole aligi al la kristanismo. Bapti suĉinfanon, kiu eĉ ne komprenetas, des malpli kapablas fari maturan decidon pri la kristanismo, estis do sensencaĵo laŭ la anabaptisma kredo.

Fine de la 17a jarcento, Jakobo Ammann agitis por diversaj reformoj ene de la anabaptisma movado, kiu tiam centriĝis en Svislando, inkluzive de pli severa praktiko de la socia evitado aŭ 'fortranĉo' de nepentemaj pekantoj disde la komunumo. La anabaptismaj episkopoj klopodadis atingi kompromison, sed Ammann montris la obstinon kaj insistemon de malnovtestamenta profeto. Li kaj liaj sekvantoj — la amananoj — do skismis kontraŭ la ĝenerala anabaptisma movado, fariĝante protestantoj kontraŭ protestantoj kontraŭ protestantoj, historia procezo konata i.a. en la interlingvistiko.... Al ĉi tiu origino ne mankis elemento de ironio, kiel ni vidos.

### En Usono

Same kiel la puritanoj, la kvakeroj kaj aliaj grupoj, la amananoj migris al Usono por eskapi sangan persekutadon en Eŭropo. Tiu migrado, dum la 18a kaj 19a jarcentoj, aŭ savis la movadon de pereco aŭ tiel malfortigis ĝin en Eŭropo, ke ĝi tie ne plu ekzistas, kvankam la anabaptismo aŭ menanismo (laŭ la nomo de la granda nederlanda anabaptisto Menno Simons) ankoraŭ floras, ĉefe en Svislando.

La amananoj starigis komunumojn unue en Pensilvanio, poste en pluraj aliaj usonaj ŝtatoj. Kvankam ĉiuj lernis la anglan lingvon, ili inter si parolis — kaj iliaj posteuloj

ankoraŭ parolas — dialekton (grandparte palatinatan) de la germana. Ili akiris bienojn kaj baldaŭ montris sin elstaraj agrikulturistoj, kutimiĝinte pro bezono en Eŭropo al kultivado sur la plej nefekunda tero.

Kiam ili unue venis, ili ne estis aparte maltipaj usonanoj, eĉ per sia germanlingveco, kiu tiutempe ne estis malofta en Usono.



### Travivado per izoliĝo

Por amananoj, specialan signifon havas du admonoj de Sankta Paŭlo: 'Kaj ne konformiĝu al ĉi tiu mondo; sed aliformiĝu per renovigado de via menso, por ke vi provu, kio estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio' (Romanoj 12: 2), kaj 'Ne estiĝu kunjuguloj maltaŭge kun nekredantoj; ĉar kian partoprenon havas justeco kun maljusteco? aŭ kian komunaĵon havas lumo kun mallumo?' (2 Korintanoj 6: 14).

La amananoj sekvas ĉi tiujn dirojn allasante nek geedzajn nek komercajn partnerecojn kun alikredanoj. Tio apenaŭ povus funkcii en la moderna mondo — sed iusence la amananoj sin apartigas de tiu mondo: ili malakceptas grandan parton de la moderna teĥniko. Maltipaj usonanoj ili nun ja estas, trovante malmultan utilon en la materiala progreso.

Ĉiu amanisma komunumo havas propran regularon. Ĝenerale, la komunumoj rekonas la malsamajn regularojn unuj de la aliaj, ĉar temas esence ne pri unuopaj reguloj sed pri preteco submetiĝi al reguloj.

La reguloj, kiuj distingas amananojn disde la ĉirkaŭa mondo, estas ĉefe tabuoj kontraŭ modernaj aparatoj, vestoj kaj vivmanieroj, kiuj povus endanĝerigi la komunumon kaj la amanisman senton de humileco antaŭ Dio.

Preskaŭ ĉiuj komunumoj malpermesas centran elektrizadon (kvankam en iuj lokoj malpli grandaj generatoroj estas uzablaj por difinitaj celoj), aŭtomobilojn kaj aliajn motorajn transportilojn, telefonojn, pneŭmatikojn sur traktoroj (kaj kelkfoje traktorojn mem) kaj agrikulturan uzon de ĉevaloj. Longajn harojn devas porti kaj viroj kaj virinoj. Edziĝintaj viroj portas barbon sed ne lipharojn, kaj virinoj portas kaptukon, kies stilo varias laŭ la komunumo. Varias ankaŭ diversaj aliaj vestreguloj, ekz. pri ŝelko — malpermeso, permeso de duona (unurimena) ŝelko aŭ permeso de plena ŝelko.



La ĉi-sezona pariza modo malmulte influas la vestostilon de la amananoj.

## La amanana familio

La ideala familio amanana posedas bienon kaj produktas multajn gefilojn, el kiuj ĉiuj baptiĝas kaj, mallonge poste, edz(in)iĝas. La junaj edzoj tiam akiras propran bienon aŭ transprenas tiun de la gepatroj, kiuj tamen restas kiel 'emeritaj' mastrumantoj. La junaj edzinoj — nu, unuavice naskas pli da infanoj por daŭrigi la ciklon.

Multajn legantojn ŝokos la informo, ke la tipa amanana paro produktas sep infanojn — kaj deko aŭ pli estas tute ne malofta fenomeno. Ĉu granda danĝero al la ekologio? Ne tre.

Pro sia vivmaniero, amananoj konsumas tre malmulte da energio en malabundaj formoj (karbo, petrolo, gaso). Kaj memoru, ke ili vivas en la kamparo, kiu eĉ en multaj 'troloĝataj' landoj estas malsufiĉe loĝata. Troloĝateco estas, finfine, ĉefe urba problemo, pro kiu iuj landoj eĉ kreas jurajn malhelpojn al personoj, kiuj volas transloĝiĝi en la grandurbojn el la kamparo.

Kompreneble, la priskribita idealo ne ĉiam funkcias. Malabundiĝas bienoj, tiel ke iuj amananaĵ gejunuloj devas trovi alian laboron, eĉ ekster la komunumo en kiu ili loĝas. Tio en si mem ne estas malpermesita, sed ĝi ankaŭ ne estas dezirata, i.a. ĉar ju pli okazas kontakto inter amananoj kaj eksteruloj (kiujn la amananoj tipe nomas 'angloj', pro sia propra germanlingveco), des pli minacas konformiĝo al tiu granda ekstera mondo.

Kaj ne ĉiuj gefiloj baptiĝas kiel amananoj.

## Konservi la komunumon

Tio estas unu el la ĉefaj konservaj meĥanismoj de la amanismo. Kompreneble, neniu amanano deziras, ke ie ajn juna membro de la komunumo forlasu la kredon, sed oni rekonas la neceson por vera elekto. Konfirmacio por romkatoliko — kiu ĝenerale okazas plurajn jarojn antaŭ

ol la eklezio trovas la koncernan personon sufiĉe matura por elekti geedzan partneron — estas multe malpli serioza paŝo, psikologie, ol baptiĝo por amanano. La pastro faras sian eblon malkuraĝigi facilaniman baptiĝon, ĉar forlaso de la kredo post baptiĝo estas serioza peko kaj skandalo antaŭ la komunumo.


Cetere, ankaŭ alia faktoro malhelpas al junaj viroj facilanime baptiĝi, nome la maniero, per kiu amananoj havigas al si novajn pastrojn: konskripcio, laŭ la juĝo de la komunumaj plejaĝuloj (viroj, kompreneble). Ĉiu viro per sia baptiĝo konsentas sin submeti al eventuala alvoko. La honoro ne estas avide serĉata, sed la amananoj ne dezirus pastrigi homon tiel orgojlan, ke li dezirus la postenon. Tio signifas, ke pastron oni ne respektas pro arkanaj scioj aŭ kapablo pri teologia harfendado — li principe ne havas pli da pridiaj scioj, ol ĉiu alia amanano — sed ĉar li laŭ la sperto de siaj ĉirkaŭuloj meritas tiun respekton, sen kiu li ne estus povinta fariĝi pastro.

Kvankam sen baptiĝo oni ne rajtas edz(in)iĝi kiel amanano (kaj ekstergeedzeca amoro restas patologia konduto laŭ la normoj de amanisma komunumo), la proporcio de kandidatoj, kiuj fine elektas ne baptiĝi, estas signifa. Ili ofte aliĝas al la menanismo, la formo de kristanismo plej simila al la amanismo en Usono.

Alia konserva meĥanismo estas la menciita praktiko de 'fortranĉo' de pekantoj. Fortranĉo dum limigita periodo povas funkcii kiel puno al amanano serioze pekinta kaj pentema. Sed al nepentemulo, fortranĉo estas ekskomuniko. Eĉ samfamilianoj ne rajtas manĝi samtable aŭ konversacii kun fortranĉitoj. Sekve estas tre klara la elekto aŭ penti aŭ forlasi la komunumon, lasante ĝin pura kaj nemakulita.

Fortranĉo povas okazi pro kiu ajn obstina ofendo kontraŭ la komunuma regularo. La ofendo en si mem povas esti malgrava, sed fiera sintenado kontraŭ la konsiloj de la komunumaj plejaĝuloj nepre signas la vojon al fortranĉo. Kiel la leganto povas nun konstati, Jakobo Ammann mem montris tre malamananan temperamenton, kaj iuj amananoj ja embarasiĝas pri la personeco de la homo, de kiu ili ricevis sian nomon.

Kvankam la amananoj devas ne konformiĝi al 'la mondo', ili devas do tre forte kaj tre humile konformiĝi inter si. Nek specialan lertecon nek kiun ajn alian elstarecon flegas la amanana pensmaniero. Klereco preter tre baza grado estas malofta, kaj amananoj malofte vizitas lernejon dum pli da jaroj ol estas jure devige. La instruistoj



Konformiĝon al la komunumo — ne al la ekstera mondo — la amananoj tre frue lernas kiel idealon.

# Oneida

## La utopia alternativo



de Gim-Kušino, Jugoslavio

Ekzotikaj komunumoj ne estas io nova en Usono. Jam en la jaro 1841 fondiĝis en la ŝtato Vermonto la religia komunumo Oneida, kies plej okulfrapa karakterizo estis grupa geedzeco. La iniciatinto, J.H. Noyes, estis tre fervora religia socialisto, kiu opiniis seksan kuniĝon ege grava, sed monogamion egoisma. En Oneida ĉiu viro estis la edzo de ĉiu virino, kaj inverse. Havante nur 200 membrojn en la komenco, post kelkaj malfacilaj jaroj ĝi ekprosperis kaj en sia plej sukcesa tempo havis plurajn milojn da anoj. La komunumanoj estis tre laboremaj kaj atingis altan gradon de ekonomia bonfarto, produktante arĝentaĵojn, silkaĵojn kaj aliajn metiaĵojn.



Viroj kaj virinoj laboris kune en la metiejoj, kaj la virinoj tondis tre mallonga sian hararon pro praktikaj kaŭzoj (aŭdaca konduto en tiu epoko). Malgraŭ la neortodoksa formo de geedzeco, seksaj rilatoj estis severe reguligitaj far la pli aĝaj (supozeble pli saĝaj) komunumanoj. Ili

decidis ankaŭ pri estontaj gepatroj, kiuj estis zorge selektitaj kaj parigitaj. Infanoj restis ĉe la patrino ĝis ili povis piediri, kaj tiam eniris komunan vartejon.

Alia grava trajto de Oneide estis ĝiaj kritik-sesioj, dum kiuj difinita ano (laŭ propra deziro aŭ laŭ la rekomendo de siaj ĉirkaŭuloj) estis submetita al senindulga kritikado. Al la kritikato la sperto foje estis psike tre malfacila, sed ĝi verŝajne havis terapian valoron kaj krome plifortigis la internan koheron de la komunumo.

Pro siaj avangardaj vivmanieroj la oneidanoj ricevis la malaprobos de la tiama socio ilin ĉirkaŭanta, kaj en 1879 Noyes rekomendis la forlason de la sistemo de grupa geedzeco. Oni reorganizis la komunumon kaj fine elfetis ankaŭ la socialisman posedadon de propraĵoj. Noyes foriris al Kanado kun manpleno da adeptoj, kaj la restintoj formis akcian entreprenon el la komunaj komercaj posedaĵoj de Oneida.

**John Humphrey Noyes, la iniciatinto de la komunumo Oneida, iom skeptike rigardas al nia reconstruo de oneida geedziĝa ceremonio.**



estas plejparte same malmulte klerigitaj amanoj. Aliflanke, amanoj ja lernas legadon kaj skribadon — en la angla kaj la germana — kaj aritmetikon. Oni nuntempe povas trovi en Usono universitatojn malpli klerajn!

Inter kristanoj, la amanoj distingas sin per sia manko de konvertemo. Simile al judoj, ili nek serĉas nek kuraĝigas konvertiĝon, ĉar ankaŭ la eniro de novaj personoj en la komunumon minacas ĝian identecon. Eĉ la fervora entuziasmo por la amanismo, kiun montras tiuj eksteruloj, agacas la amanojn mem, kiuj preferas la moderon antaŭ ĉio.

### En la 21an jarcenton

Ĉu ĉi tiu anakronisma vivmaniero formortadas? Tute ne. Iuj ĝin forlasas, sed kun meze sep infanoj en familio,

la amanoj daŭre plinombriĝas. Eble la regularoj emas reviziigi en la direkto de la progreso — unu pensilvania komunumo jam permesas aŭtomobilojn! — sed restas sufiĉe da distanco inter la vivmanieroj amanisma kaj 'angla', ke asimilado ne minacas. La priskribitaj meĥanismoj — malkuraĝigo de facilanima baptiĝo, fortranĉo de ribeluloj kaj manko de konverta agado — malhelpas revolucion de interne.

Kompreneble, kun la daŭra plidensiĝo de la terloĝantaro, povos veni punkto, kiam la amanoj sentos sin sub kultura premo. Sed iuj sciencistoj jam diskutas planojn por artefaritaj komunumoj en la spaco, dum aliaj elpensas manierojn taŭgigi Marson kaj Venuson por homa vivo. Ne devus esti surprizo, se la amanoj montriĝus en la unua vico de la koloniantoj de la kosmo.



de Daniela Deneva, Bulgario

Ekde tre antikvaj tempoj la homaron zorgigas la san-problemo. Dum jarcentoj la homoj amasigis sciojn kaj spertojn pri la kuracado de diversaj malsanoj. Post tio estiĝis la medicino kiel scienco. La rapida sciencteknika evoluo estis premiso de la gravaj atingoj de la moderna medicino. La fundamentaj kuracrimedoj, uzataj de ĝi, estas la kemiaj medikamentoj kaj amaso da aparatoj. Sed paralele kun la oficiala medicino oni povas paroli pri kompleta kuracila sistemo, kiu estas rezulto de la ĉirilataj popolspertoj. Tiun sistemon ni nomu sekve 'popola medicino'. Ties ĉefa diferenco disde la moderna medicino estas, ke ĝi uzas precipe kuracrimedojn, kiuj ne kaŭzas malbonan kromefikon ĉe la organismo; la popolkuracado estas kompleksa ĉar ĝi efikas kaj sur la malsanan organon kaj sur la tutan organismon; dum la kuracado oni aplikas la necesajn rimedojn por ĝenerala plifortigo de la organismo per ŝanĝoj de manĝkutimoj kaj vivmaniero. Oni povas teorie pristudi la kuracmetodojn de la popola medicino el la vidpunkto de la moderna medicino.

La unuarangaj kuracmetodoj de la popola medicino estas: drogherboj, fizioterapio kaj psikoterapio. Popolmedicino krome okupiĝas pri profilaktiko kontraŭ malsanoj.

La ideo de drogherbo ne estas nova. La kuracherboj estas konataj al la homaro ekde la antikveco. Pri la konoj de la tiamaj popoloj ni multon scias dank' al skribmemoraĵoj kaj arkeologiaj postrestaĵoj. En antikva Asirio oni trovis ceramikajn platetojn kun surskriboj pri la diagnozo de multaj malsanoj, kun indikoj pri la drogoj uzablaj por ties kuracado. La egiptoj asimilis la atingojn de la asira kaj babilona medicinoj kaj plivastigis la sciojn pri la kuracrimedoj. Por havigi al si drogojn oni organizis specialajn ekspediciojn. Hipokrato, la patro de la medicino, priskribas ĉirkaŭ 250 kuracherbojn, kiujn oni tiam konis. Gravajn sukcesojn en la malnova medicino atingis ankaŭ la araboj. Ili unue aplikis drogherbojn por kuraci bestojn. La fama mezepoka sciencisto Aviceno en sia kvinvoluma verko *Kanono de la kuracarto* priskribas ĉ. 900 drogojn.

Dum la Renesanco la sciencisto Paracelsus komencis la esploradon de la kemiaj konsistaj partoj en la vegetaĵoj por serĉi la aktivefikajn substancojn en ili, sed la kemia analizo eniris la efektivan praktikon nur post 300 jaroj. En la 19a jarcento, rapide evoluadis la farmacia industrio, kaj do ankaŭ la moderna medicino. La grandaj kemiaj malkovroj dum la sama jarcento kondukis al evoluo de la fitokemio. Dum antaŭ 100 jaroj la baza metodo por produktado de kuraciloj estis la ekstrakto de aktivefikaj substancoj el plantoj, t.e. fitokemio, nun en nia jarcento la superecon havas la sintezaj kemiaj medikamentoj. En la kvindekaj jaroj oni eltrovis la antibiotikojn, kiujn oni ekstraktis el apartaj fungoj. Tio kaŭzis novan esplortajdon pri la plantoj. Lastatempe kune kun la kemiaj kuraciloj oni pli kaj pli aplikas la fitoterapion.

## Ĉu moderna aŭ popola medicino?



Aviceno (980-1037 p.K.), pioniro en la scienca registrado de drogherboj. La ofte legata aserto, ke Aviceno estis arabo, estas nur parte ĝusta, kiel ankaŭ la PIV-a pretendo, ke li estis iranano. Abu' Ali' ibn-Sina' (esperante: Aviceno) efektive estis uzbeko, kiu naskiĝis en Afsanah' ĉe Buĥarao (nuntempe en Soveta Uzbekio). Konforme al la tiam kutimo en la islama Centra Azio, li verkis siajn sciencajn traktatojn en la araba, kaj siajn beletrajn verkojn en la irana lingvo, parenca al la nuntempaj taĝika kaj novpersa.

La avantaĝo de drogherboj kompare kun la sintezaj medikamentoj estas ke la vegetaĵaj substancoj formiĝas en vivanta ĉelo. Malgraŭ la funkcia diferenco inter vegetaĵoj kaj bestoj, la fundamentaj unuoj — la ĉeloj — kiuj kreas la organismojn, kaj de la bestoj kaj de la plantoj, havas multajn similecojn, nome la konsisto de la ĉeloj kaj la analogeco de kelkaj gravaj biokemiaj procezoj en ili. Dum milionoj da jaroj la bestoj, nutrante sin per vegetaĵoj, alkonformiĝis al ties substancoj. Jen kial la aktivaj substancoj en la vegetaĵaj ĉeloj, eĉ se venenaj, ne detruas abrupte kaj perforte la procezojn en la vivantaj homaj ĉeloj, kiel faras kelkaj kemie produktitaj kuraciloj. La drogoj kaŭzas aparte favoran kuracefikon ĉe kronikaj kaj maljunulaj malsanoj, ĉe kiuj la defenda kaj venenrezista kapablo de la organismo estras grave malfortigita.

Por prepari medikamentojn laŭ fitokemiaj metodoj, oni ekstraktas nur iujn aktivefikajn substancojn. Kune kun tio, oni detruas multajn aliajn utilajn konsistaĵojn, kiuj povus havi favoran efikon al la sano. Tio ĉi atestas la superecon de la drogoj super la fitokemiaj kuraciloj.

Krom kuracherboj, la homoj aplikas diversajn mineralojn de neorganika deveno (ekz. kelkajn specojn de argilo kiel rimedon kontraŭ ŝvelaĵoj), kaj substancojn de besta deveno (grason ktp.).

La fizioterapio estas grava parto de la medicino. Ĝi enhavas multajn metodarojn. En la popola medicino oni aplikas tiujn, por kiuj oni bezonas ne specialajn aparatojn, sed nur disponeblajn rimedojn. Grandan signifon havas do la akvaj, aeraj, sunaj, klorofilaj, aerolumaj proceduroj, kune kun banoj, kup-aplikoj kaj masaĝoj.

La efikmekanismon de la popolaj fizioterapiaj metodoj oni povas klarigi el la vidpunkto de la fiziologia teorio de I.P. Pavlov. La procedurojn sur la tuta korpo oni klarigas per la reflekso ekscito de multaj organsistemoj. Okazas





**La kupoterapio estas ankoraŭ uzata kiel helpa kuracrimedo en la nuntempa Ĉinio.**

incitado de la nervaj finaĵoj en la haŭto. Responde en la centra nerva sistemo ekformiĝas impulsoj al la organoj, kiuj certigas la defendon de la organismo kontraŭ diversaj eksteraj influoj kaj funkciigas ilin. La efiko de la lokaj proceduroj kiel kompresoj, kupoj, masaĝoj ktp. estas klarigebla kiel akcelo de la sangocirkulado kaj sangalfluo al la loko de apliko. Por kuraci malsanulojn kontraŭ hipertonio, oni uzas ankaŭ hirudojn. La saman pozitivan rolon ludis dum la Mezepoko la skarifikado, malgraŭ tio, ke ĝi estis mise uzata kontraŭ preskaŭ ĉiuj malsanoj.

La uzado de diversaj nutrodietoj kompletigas la katalogon de la fizioterapiaj kaj fitoterapiaj metodoj. La problemo pri racia nutrado ĉiam pli kaj pli interesas la modernan homon. Kiel manĝi por havigi al la organismo nur la plej necesajn substancojn? Ĉu ni manĝu viandaĵojn aŭ estu vegetaranoj por gardi nin kontraŭ malsanoj aŭ resaniĝi? El medicina vidpunkto regas la opinio, ke ĉar en la vegetaj nutraĵoj mankas kelkaj aminacidoj, kiuj troviĝas en la viando kaj en la homa albumino, por la kreskantoj la viando estas absolute necesa kune kun la vegetaraj nutraĵoj — fruktoj, legomoj kaj laktaĵoj. Ĉe la pliaĝuloj tiu bezono reduktiĝas. Tamen rilate la profilaktikon kontraŭ iuj malsanoj (unuavice arteriosklerozo kaj diversaj koraj, hepataj kaj renaj malsanoj), la nutraĵoj devas esti precipe vegetaraj.

Vaste konata estas la kuracado per malsatado. Pri ĝia malnova historio atestas religiaj kutimoj kaj ceremonioj restintaj el pasinteco — ekzemple la fastado. La metodo poste eniris la oficialan medicinon sub la nomo 'malŝarĝiĝo', kiu efektiviĝas per plena rezigno pri manĝado aŭ per parta abstinado. La malsatadreĝimon oni determinas depende de la karaktero de la malsano kaj de la malsana organismo.

Kiel parta abstinado oni povus trakti la 'krudajmanĝadon'. Ĝi havas multajn pozitivajn flankojn: en la krudaj nutraĵoj konserviĝas pli bone la vitaminoj kaj la mineralaj substancoj, en la legomoj kaj la fruktoj ankaŭ la celulozo, kiu havas gravan fiziologian rolon en la homorganismo.

Paralele kun tiuj pozitivaj ecoj, la krudaj nutraĵoj havas tamen iujn negativajn flankojn. Ili estas pli malfacile digesteblaj, kaj ĝenerale enhavas malpli nutrajn substancojn (albuminojn, grasojn, karbohidratojn) ol la koncernejaj kuiritaj manĝaĵoj ĉe egala amplekso. Pro tio la popolmedicino ne rekomendas daŭran krudmanĝadon. Plej utilas la konsumado de ambaŭ specoj de nutraĵo.

La psikoterapio havas gravan, sed nur helpan rolon. Inspiri al la paciento kredon pri la sukceso de kuracado estas konata regulo ekde antikvaj tempoj. La fundamentaj metodoj, kiujn oni aplikas, estas sugestio, memsugestio kaj hipnoto. La senesperigo pro la malsano kaj malsukcesoj, obsedaj pensoj, malagrablaj emocioj malfortigas la efikon de kia ajn kuracado. Kontraŭe, la bonhumoro, la trankvileco, la optimismo helpas por supervenki la malsanon pli rapide. La forto de sugestio estis pruvita antaŭ multaj jarcentoj. Metodoj kiel magiaĵo, elpelo de spiritoj ktp. estas plenaj je religia mistiko, sed ili havis pozitivan influon sur la malsanuloj. Pri la graveco de la sugesti-problemo atestas la fakto, ke la moderna medicino kreis tute novan fakon — la 'iatrogenion' — kiu kontraŭbatalas la malboniĝon de la sano pro senkuraĝigaj kaj nedelikataj paroloj de la ĉirkaŭuloj. La hipnoto havas pli limigitan disvastiĝon, ĉar ĝin povas apliki nur fakuloj, kaj ĝi ne ĉiam estas utila.


Rilate profilaktikon la popola medicino rekomendas vivstilon konforman al la naturo — racian uzadon de la sunlumo, vegetajn nutraĵojn, konvenajn vestojn de konvenaj koloroj, gimnastikon, sporton, hardadon de la organismo, turismon, kutimon al pozitivaj pensoj kaj emocioj k.a.

Konklude oni povas diri, ke la rimedoj de la moderna medicino estas necesaj kaj bonefikaj dum la krizaj malsanstatoj, sed ĉe la kuracado de kronikaj malsanoj pli favoraj kaj sendanĝeraj estas tiuj de la popola medicino.

Oni ne rajtas subtaksi la sukcesojn en la sinteza farmacio kaj ĝiajn eblecojn, la teknikan progreson en la medicino, sed oni devas ne forgesi, ke de la naturo ni jam ricevis ĉion, kion ĝi povas doni por la sano de la homaro. ■



**Artemizio, sudeŭropa drogplanto, kiun uzis jam la antikvaj grekoj.**



de Probal Daşgupto, Hinda Unio

## Pri alternativaj evolu-stiloj

Kvankam troglodita *PIV* ne scias tion, **alternativo** rajtas ankaŭ signifi 'alia ebleco', eĉ 'alia ebleco ol la kutima'. Tio estas ĝia senco en la esprimo **alternativaj viv-stiloj**. La kutima viv-stilo, kompreneble — ĉar ni estas inter eŭropanoj specife kaj okcidentanoj ĝenerale — estas la norma viv-stilo de prosperaj landoj, al kiu aspiras multaj homoj sen ebleco vivi laŭ tiu stilo. Alternativaj viv-stiloj do estas tiuj alternativoj, al kiuj anstataŭe sopiris kaj sopiras minoritataj okcidentanoj, kiuj elektis Eliron el la norma sistemo por vivi pli 'vere' aŭ verve ol la normuloj en la sufokaj socioj.

Kiamaniere homoj en malriĉaj landoj (ekzemple evolu-landaj legantoj de *Kontakto*) emas rilati al tia Eliro? Tion oni eventuale konstatos en ĉi tiu kazo, se kaj kiam tiaj legantoj pafos reagojn al la redakcio. Pli ĝenerale, la sintenoj estas diversaj, kiel oni povus atendi.

Luj, 'maŝinemuloj', opiniis la fenomenon infaneca distribo de riĉ-landaj senzorguloj, rekte danĝera por la evoluo de la homara plimulto, kiu bezonas ĝuste koncentri siajn fortojn por atingi la ĝeneralan unuan celon, la bazan minimuman prosperon en ĉiuj socioj. Laŭ maŝinemuloj, estas tro frue por luksi pri pli belaj alternativoj, ĉar ties vasta enkonduko okazigus kaoson en la sistemoj de soci-politika organiziĝo kaj edukado, kiuj baziĝas ĉiuj sur rigoraj kaj nete industriaj bezon-supozoj. Aliaj, 'romantikuloj', agas por alternativoj rilate la evoluon de malriĉaj landoj, kaj do vidas en iuj klopodoj de okcidentanoj pri alternativo ion parenca al la propraj streboj. Sekve ili vidas en la okcidentaj alternativemuloj eblajn aliancinojn en la batalo kontraŭ la vasta, firma tendenco ne tuŝi la fundamentan fidon al la benzina plus nuklea industri-modelo.

ANKORAŬ alia grupo, ĵus enirinte la malalternativan riĉecon, volas unue ĝui ĝin anstataŭ esti ĝenata de pensantoj pri la absurda ebleco ne riĉi tiu-stile. Tie apartenas, ekzemple, la naftaj milionuloj kaj tiuj, kies interesoj kongruas kun ili. Tiaj personoj ofte **aktoras** kiel tiuj, kiujn mi ĉi-supre nomis 'maŝinemuloj'.



Mi volus plu paroli pri la romantikuloj, ĉar ili estas por alternativemaj okcidentanoj la plej prisciinda grupo, ŝajne. Oni tre ofte ne memoras, ke ekzistas tiaj homoj eĉ en malriĉaj landoj.

Estas bone komenci per ekzemplo pozitiva. La ĉinoj en la kvindekaj jaroj decidis reenkonduki la akupunkturajn kaj tradician herban medicinon en la landan sistemon de medicinaj eduko kaj kuracado, man-en-mane kun la klasika okcidenta medicino antaŭe akceptita kiel la sola vero por modernaj ĉinoj. Kiel oni nun ĝenerale scias, la rezultoj estis fenomene bonaj. Eĉ okcidentaj medicinistoj en siaj prosperaj, moderne ekipitaj landoj fine devis miksi kun (antaŭvideblaj) grumbloj kaj ignoraj kelkan

agnoskon de la pli okul-frapaj sukcesoj de nuntempaj akupunkturistoj. Siaflanke okcidentaj alternativemuloj, kompreneble, ofte apogis la akupunkturajn kaj herban medicinon. Instigo al tio estis la katastrofa socia rolo de klasikaj okcidentaj kuracistoj, precipe en la socioj kie tiuj kuracistoj estas bone organizitaj, havas preskaŭ policajn kaj monopolajn povojn, kaj arte konservas siajn financajn privilegiojn.


Notu ke, kiam la ĉinaj gvidantoj reinstalis la tradician ĉinan medicinon, ne ekzistis garantio, ke ĝiaj metodoj montriĝos same aŭ pli efikaj, ol tiuj de la moderna okcidenta medicino. Temis pri riska decido, kiun oni faris fidante al siaj sentoj. Kaj ĝi montriĝis saĝa. En Ĉinio, oni ne plu povas nomi (se oni iam povis) la tradician ĉinan medicinon alternativa, ĉar ĝiaj metodoj nun estas integritaj en la norman sistemon. La romantikuloj de hieraŭ fariĝis 'klasike' akcepteblaj.

Kontraste, konsideru la klopodojn de la hinda gvidanto Mahatma Gandhi. Li volis vekti sian popolon al malcentra, loke memsufiĉa teknika renesanco, kiu evitigus la frenezojn de evoluo en modernan maŝinaran socion. La simbolo de lia klopodo, la ŝpin-rado, furoris dum la dudekaj kaj tridekaj jaroj kiel ĉefa simbolo de la nekunlaboro de la liberiĝonta hinda popolo kun la brita industria ekonomio. Gandhi konsilis al ĉiuj hindoj, sendiference pri socia aparteno, ŝpini almenaŭ duonhoron ĉiutage. Tiel, laŭ li, ili retrovos la homan dignon labori por sia bezono per la propraj manoj anstataŭ submetiĝi al akre



Maldekstre, diagramo farita duonjarmilon antaŭ Kristo por montri akupunkturajn meridianojn kaj punktojn; dekstre, operacio en ĉina hospitalo nuntempe, kun uzo de akupunktura anestezo.

**Gandhi ne nur predikis la ŝpinadon, sed ankaŭ ĝin praktikis.**



dividita imperia socio, en kiu maŝinoj peras inter privilegiuloj — kiuj disponas pri la grandaj maŝinoj kaj konstante ŝvitigas ĉe ili la proletojn — kaj amasoj da senspinuloj, kiuj konsumas la produktaĵojn de tiuj maŝinoj kaj la mensogojn de iliaj posedantoj. Multaj hindoj de la generacio de kaj ĝuste antaŭ miaj gepatroj sekvis tiun konsilon.

Sed la granda reorganizigo ne povis okazi. Gandhi ne havis la decidan voĉon rilate evolu-stilon. Tion havis Ĝavaharlal Nehru, la unua ĉefministro de Hinda Unio. Nehru favoris industriigon kaj elektrizon laŭ kvinjaraj planoj. Gandhi estis murdita en 1948. La kvinjaraj planoj ekfunkciis en 1952, kiam la nomo kaj idealoj de Gandhi estis en ĉies buŝo, sed, en la praktiko, estis aplikataj malaj, okcidentaj ideoj. Nur dum la regado en 1977-79 de homoj, kiuj volis iel diferencigi de la strategio de Nehru (kaj de lia filino Indira Gandhi), oni subite aŭdis pri ia neceso efektive revivigi la proponojn kaj moralan fonon de Mahatma Gandhi en la ekonomia programo de la landa evoluo. Tiu revivigo, kiel oni scias, ne okazis, krom en apartaj lokaj provoj, kiuj ĝuis modestan sukceson. Sed la ideoj de Gandhi, kiel propono pri evolu-direkto, restas aktuala temo de diskuto. Malkiel akupunkturo, la afero ne estas sukces-rakonto, sed ĝi eble levas pli vastajn demandojn por okcidentaj amantoj de renesancoj. Ĝi havas kun la afero akupunkturo la komunan elementon de aventuro, de riska manko de antaŭscio pri sekvoj de tia programo. Mi do nun parolu pri la principoj.

Mahatma Gandhi estis malamiko de la moderna okcidenta civilizo, kies sociajn sekvojn li funde spertis dum jardekoj da politika agado en Sud-Afriko. El lia vidpunkto, estas finfine malbona por la socia sano ĉio, kio helpas al homoj en unu regiono superregi homojn en alia, fora regiono — do, ekzemple, la eblo rapide kaj senĝene porti militilojn kaj armeojn de unu lando al alia. Por ke homoj vivu digne kaj senriske, necesas, ke proksimume ĉiu loko estu memsufiĉa, kaj ke grandskala komercado trans longaj distancoj ne estu viv-necesa. Ĉi tiuj pensoj kondukas al la ideo malmunti aŭ draste redukti sciencajn kaj teknikajn projektojn por pliluksigo de la vivo. La popularigo de la ŝpin-rado estis, por Gandhi, nur unua paŝo survoje al ĝenerala malmodernigo kaj malcentrigo.

Robindronath Tagor, rolulo en la hinda kultura renesanco kiu efektive okazis (diference de tiu, kiun Gandhi volis), longe debatis kun Gandhi pri tiuj ideoj. Laŭ Tagor, la senfantazia unuecigo kaj surlokigo de ĉies viv-stiloj kaj la strebo for de luksoj, eĉ la 'luksoj' de scienca esplorado

kaj konstanta intervojaĝado trans longaj distancoj, neas la aventuran strebon al diverseco de la homo kaj rifuzas la viv-raĵon de la homa inteligento, kiu postulas pliriĉigon de niaj scioj pri la realo. Gandhi eksplikis, ke la abstrakta ekkono de la realo estas valora ne en si mem sed nur en rilato al la kompleta, digna homo, kiu ekkonu la realon; kaj ke, se la sekvado de scienca vojo kondukas al socio kontraŭa al tiu digno por siaj membroj, tiam endas kontraŭstari la sciencajn vojojn kaj elekti alian pli taŭgan.

Iuj eble aldonos, ke la tension inter tiuj vidpunktoj oni povus portempe kaj konvene solvi per starigo de kvazaŭ modelaj projektoj ĝuste laŭ la penso de Gandhi ene de kaj kune kun la ĉefa socio. Sed tio ne eblas. La vizio de Gandhi pri malcentra socia ordo ne estas ideo testebla per starigo de eksperimentaj loketoj 'loke memsufiĉaj' en interignora rilato kun la ĉirkaŭanta socio de la scienca speco. Unue, tia reciprokeco de ignoro estas home ne ebla. Due, eĉ se tia komunumo realigeblus, ĝi ne donus modelojn ĝenerale uzablajn, ĉar oni tamen ne scius, kiel aspektus tuta socio organizita laŭ tiu pensmaniero. Necesas principa elekto ĝenerala.



**Nehru kaj Gandhi: aliancanoj, sed ne samideanoj.**

Eble, finfine, ĉu temas nur pri tio, ke hom-tipoj kaj klimatoj, estante diversaj, postulas, ke iuj komunumoj estu pli 'sciencaj' kaj aliaj pli 'memsufiĉaj'? Sed ne sufiĉas papagi tiun supozon pri pluralismo. Se oni ne faros principan konkludon, ke ambaŭ viv-tipoj estas efektive egale kaj malsame valoraj por difinitaj celoj kaj en specifaj medioj, kaj se tiu konkludo ne estos ĝenerale kredata, tiam la nunaj malestimoj kaj frenezaj vetkuroj daŭros sen plisaĝigo de siaj partoprenantoj. Oni tamen ja bezonas diskutadon pri la principoj. Ĉu alternativaj modeloj apudekzistu kiel kandidatoj por estonta unu-stila mondo, aŭ ĉu la kunezisto de stiloj pretendas esti daŭra solvo? Ĉu elpenseblas kaj aplikeblus interkonsento pri paca kunezisto de viv-stiloj?

Pardonu — mi ne volis interrompi vian feliĉan seminarion por okupiĝo pri efektivaj estonteco-pensoj de homoj, por kiuj tio havas vivan gravon. Kiel konate, la plej validaj rezultoj fontas el diskutoj pri aferoj, kiuj neniom tuŝas la diskutantaron. Tial oni provas elekti juĝistojn senpartiajn, distancajn de la disputo. Bone. Mi lasos al la senpartiajn, internacie seminariojn, la facilan taskon juĝi inter la diversaj programoj pri evoluo. La malriĉaj landoj tuŝas vin nur kiel la fonto de tiuj ĝenaj enmi-grantoj en viajn sociojn, kaj tio, feliĉe, ne difektas vian senpartiecon....



de Mieko Daibuzono, Japanio

# Imunoterapio

## Alternativa rimedo kontraŭ kancero

Kuracado de kancero estas batalo kontraŭ la morto. Eĉ sanajn homojn timigas kancero, kiu povus ataki ilin subite iun tagon. Ĉu homoj ne povas eviti tiun timon? Ĉu nenio restas al tiuj, kiuj nun suferas kanceron, krom morto proksimiĝanta?

En 1972 K. Fuzita, 16-jaran japanon, atakis Jüing-osto-sarkomo, kiu povus mortigi ene de unu jaro. La junulo tamen nun studas en Tokio, tute resaniĝinte de la diabla malsano. Eĉ ne necesis amputi lian kancerigitan kruron. Ĉu vi kredas, ke nun sane vivas en Japanujo kelkdek mil eksviktimoj de diversaj kanceraj, kiujn oni antaŭe diagnozis nesanigeblaj?

Ne estas lastatempe, ke la imunopation por kuracado de kancero unue eltrovis d-ro Maruyama en Japanujo, kiel rimedon por anstataŭi la terapiojn kemian, radiadan kaj operacian. Antaŭ ol d-ro Maruyama eltrovis SSM-vakcinon (SSM = Speciala Substanco de Maruyama) por la imunoterapio, lin okupis la esplorado de vakcinoj por resanigi viktimojn de tuberkulozo kaj Hansen-malsano (lepro).


Komencante sian esploron en 1944, li forigis nocajn elementojn el tuberkulina likvaĵo kaj faris sian unuan SSM-vakcinon, kiu sukcesis forigi tuberkulan haŭtmalsanon kaj la neŭran paneon de Hansen-malsano, por kiuj kemia terapio per ekz. streptomicino estis tute senefika. Dume d-ro Maruyama eltrovis la gravan faktan, ke inter tuberkulozoj kaj Hansen-malsanuloj troviĝas neniu kancerulo. Kancero ne povas ekzisti en la korpo, kie vivas tuberkulozaj kaj lepraj baciloj. Ambaŭ tiuj baciloj apartenas al la sama familio kaj havas la econ malhelpi la kreskadon de kancero.

D-ro Maruyama daŭrigis la esploron pri SSM-vakcino, kredante ke ĝi povos krei la antiksenojn ankaŭ kontraŭ kanceraj ĉeloj. Fine li sukcesis fari sian novan SSM-vakcinon, kiu konsistas el polisakaridoj kaj nukleacido.

Kiel klinika eksperimento, SSM estis unue uzata nur por pacientoj, kies kancero estis en la fina stadio. Dum la eksperimentado de 1968 ĝis 1972, tiun terapion ricevis 2 474 viktimoj de 26 specoj de kancero kiel pulmokancero, cerba ulcero, ovaria kancero ktp. 1 171 el ili tute resaniĝis; 1 303 ne povis. La savo de preskaŭ 50 procentoj de tiuj pacientoj kun fatalaj simptomoj aŭguris helan estontecon kontraŭ la 'nekuracebla malsano'. Sekve, inter 1973 kaj 1976, ĉirkaŭ dudek mil suferantoj de kancero — ĉi-foje ne nur tiuj en la finaj stadioj — aliĝis volonte al la eksperimentado, kun mirinda efiko.

Kiel malsamas imunoterapio de la ĝisnunaj ĉefaj terapioj kontraŭ kancero? Operacia terapio — eltranĉo de la afliktita parto — utilas nur por frustadia kancero kaj emas malsukcesi depreni ĉiun kanceran ĉelon. Radiada terapio povas sukcese detrui malsanajn ĉelojn sed ne

lerte: ĝi fakte ne povas eviti detrui ankaŭ normalajn ĉelojn, kaj kaŭzas sur la korpo danĝerajn efikojn, pro kiuj la paciento povus eĉ morti. Kemia terapio — per medikamentoj — kaŭzas multajn nocajn kromefikojn kiel febro, naŭzo, perdo de apetito, sangado, malmultiĝo de leŭkocitoj kaj tiel plu.



D-ro Maruyama staras meze. S-ino Papaĵoĝio (dekstre) el Greklando resaniĝis de kancero de ovarioj kaj pelvo per SSM.

Tute malsame de tiuj metodoj, kiuj celas detrui rekte la malsanan parton, la imunoterapio celas malaperigi tiun parton per la helpo de forta antikseno en la korpo. Do imagu, ke unu regionon de via lando invadis diablaj malbonuloj, kiuj pli kaj pli malbone traktas la popolon de la regiono. Por haltigi la disvastiĝon al la cetera lando, vi trovas du metodojn: unu estas detrui la tutan regionon per bomboj (tiaj estas la kemia kaj radiada terapioj) kaj la alia, sendi al la regiono amikojn sufiĉe fortajn por venki la malbonulojn. Tial ne utilas uzi samtempe la imunoterapion (vakcinan terapion) kaj kemian aŭ radiadan terapion. La eksperimentado per SSM montras, ke imunoterapio pli rapide kaj sekure efikas. Cetere, la ĝisnunaj raportoj de la SSM-eksperimentado certigis al ni, ke SSM:

- 1 havas **neniun** malbonan kromefikon (male, multaj raportas, ke ĝi ilin igis pli sanaj ol antaŭe);
- 2 malhelpas la kreskadon de kanceraj ulceroj kaj malaperigas ilin;
- 3 helpas plilongigi la vivon;
- 4 efikas kontraŭ ĉiu speco de kancero (leŭkemio, cerba ulcero, ostosarkomo ktp.);
- 5 helpas malaperigi la dolorojn de pacientoj kun mortiga kancero.

Lastatempe alian imunoterapion por kancero, BCG-terapion (BCG = bacilo Calmette-Guérin), esploris d-ro Maté en Francujo. Tamen, dum SSM de d-ro Maruyama estas ekstraktaĵo de homa tuberkulozo, BCG venas de bova



# Laŭlekta tradukado Ĉu ebla en Esperanto?

## 3. Ekzemploj pri traduko inter lektoj kaj Esperanto

Por doni 'karnon kaj sangon' al la pli frue prezentitaj teoriataj ideoj, mi klopodos per ekzemploj montri tion, kio efektive okazas kiam oni tradukas el lektoj en la unulektan Esperanton.

tuberkulozo kaj havas plurajn malbonajn efikojn, kaŭzante febron kaj ulcerojn. Ĉe la Internacia Konferenco pri Kancero en Florenco en 1974, la esploron de d-ro Maruyama alte taksis ĉiuj esplorantoj en la studado de kancero. Plimultiĝas nun la eksterlandaj pacientoj, kiuj venas al Japanujo por ricevi la kuracadon per SSM.

La SSM-terapio tamen ankoraŭ suferas gravan problemon. La japana ministerio de sano kaj bonfarto hezitas aprobi la ĝeneralan vendadon de SSM nur ĉar la eksperimentoj je bestoj ankoraŭ ne sufiĉas. Iuopinie kancero transplantita en bestan korpon tre malsamas de kancero spontane kreskinta en homa korpo. Estas nekomprenoble kial la japana registaro fermas la okulojn al la sukcesa atestata rezulto de SSM-terapio je homa kancero. Kial ĝi devas postuli pli da eksperimentoj je besta kancero? La japana registaro malhelpas bonan eblecon por la viktimoj de kancero en la tuta mondo. Mi opinias, ke la laboro de d-ro Maruyama vere meritas Nobel-premion.

Kvankam SSM-vakcino estas farata nur en Japanujo nun, por ĉiu paciento kiu volas SSM, la esplora instituto de

## 3.1. Pri la aŭtoro de la dialekta teksto kaj pri la tradukinto

Estas oportune, ĉefe por neitalaj legantoj, havi kelkajn informojn pri la fono de la prezentotaj tekstoj, ĉar fono ja gravas en ĉi tiaj tekstoj.

Ĝusepe Ĝoakino Beli (itale: Giuseppe Gioacchino Belli)





d-ro Maruyama malfermas sian pordon. La SSM-vakcino estas senpaga, kaj la kosto de konsultado estas 5 000 enoj (ĉirkaŭ 25 usonaj dolaroj): tre malkara, kompare al la kostoj de la aliaj terapioj. Oni donas la vakcinon unue por 40 tagoj al paciento en Japanujo kaj por 80 tagoj al tiu en eksterlando. La vakcino estas daŭre ricevebla. Oni petas, ke ĉiu prenanto de SSM raportu pri la procezo de sia vakcina kuraciĝo. Cetere, ĉiu kiu deziras SSM-kuracadon devas prepari:

- 1 konsenton de sia kuracisto, kiu povos injekti la vakcinon;
- 2 mallongan historion de siaj malsanoj (inkluzive tuberkulozan, lepran);
- 3 radiografajon de sia malsana parto.

D-ro Maruyama rekomendas, ke eĉ kiam kancero tute malaperis el la korpo, la pacientoj daŭrigu la vakciniĝon kvin jarojn por certigi, ke kancero ne plu produktiĝu. Laŭ la raporto multaj resaniĝas rapide post kelkaj monatoj. D-ro Maruyama mem prenas SSM unu fojon ĉiu-semajne por protekti sin kontraŭ kancero. Espereble venos la tempo, kiam ĉiu, kiu timas kanceron, povos ricevi SSM kiel protektajon. Aŭdante de pluraj personoj, kiuj resaniĝis per SSM de kancero, mi mem ne plu povas rigardi kanceron kiel timigan malsanon. Kaj mi elkore esperas, ke nia registaro iom saĝe traktos la aferon. Por tiuj, kiuj nun serioze suferas kanceron, mi ĉi tie metas la adreson, per kiu ili povas ricevi pliajn detalojn pri la SSM-vakcino: Maruyama-Vakcino, p/a Nippon Medical College Fuzoku-Hospital, Sendagi 1-1-5, Bunkyo-ku, Tōkyō, Japanujo (tel. 03-822-2131).

*antikseno:* tiel nomiĝas diversaj substancoj en animala sero, kiuj detruas aŭ alie senefikigas aliajn, fremdajn substancojn; alia nomo estas *antikorpo*.

Eĉ nemedicinistoj povas konstati la ŝanĝon ĉe 64-jara viktimo de pulmokancero, kies SSM-kuracado komenciĝis 1974 12 08. La unua radiografajo estis farita 1975 01 08; la lasta, 1975 02 21.



estas unu el la ĉefaj italaj poetoj de la pasinta jarcento. Li naskiĝis kaj vivis en Romo dum la tempo de la Papa regno, do, kiam la Papo estis samtempe spirita gvidanto kaj registarestro. Li prikantis, en pli ol du mil sonetoj, la vivon de simplaj popolanoj, iliajn zorgojn, ilian malriĉecon, la maljustaĵojn, kiujn ili spertis. Lia kritiko de la tiama malprogresema roma socio restas ankoraŭ aktuala, kaj la klarvideco de kelkaj liaj kontraŭregistaraj sonetoj igas lin elstara intelekta figuro, tre pli elstara ol multaj aliaj poetoj, kiujn romantikismo abunde produktis en tiu epoko.

Kompreneble Beli paroligas la rolulojn kiel ili efektive parolis en la vivo kaj li uzas nur la tiaman roman dialekton. Ankoraŭ nuntempe kutime parolas specon de literatura itala nur kvarono de la italoj. Du kvaronoj ŝanceliĝas inter la itala parola lekto kaj lokaj lektoj, kaj unu kvarono uzas nur lokan lekton (maljunuloj, kamparanoj ktp.).

Gaŭdencjo Pisoni (itale: Gaudenzio Pisoni), la tradukinto, estas elstara internacilingva poeto, ano de la verkista grupo 'La Patrolo', aganta ĉirkaŭ la revuo *Literatura Foiro*. Li aparte interesiĝis pri tradukoj en Esperanton el italaj lokaj lektoj, eble ĉar sentoj esprimitaj en lokaj lektoj estas (en Italujo) pli veraj, pli popolaj, sen la falsa vualo kiun ofte aldonas al ili la artefariteco de la literatura lekto. Li gajnis premion en la Belartaj Konkursoj en la jaro 1971 per traduko al Esperanto el la napola dialekto.

### 3.2. Pri la dialekta teksto

Jen la rom-dialekta teksto de la soneto *La scerta der Papa* (La elekto de la Papo):

*So' fornaciario, si, so' fornaciario,  
So' un cazzaccio, so' un tufo, so' un cojone:  
Ma la raggione la capisco, a paro  
De chiunque sa intenne la raggione.*



Antaŭ ol UEA ĉesigis la tradukajn branĉojn de la Belartaj Konkursoj, Gaŭdencjo Pisoni kaptis sep premiojn por siaj poemtradukoj: unuan en 1969, 1970 kaj 1971; duan en 1975; trian en 1969, 1970 kaj 1974. Jen li (postkuke, kun cigaredoj enbuŝe kaj enmane) kun aliaj anoj de la renoma literatura rondo 'La Patrolo'.

*Scejenno un Papa, sor dottor mio caro,  
Drent'a 'na settantina de persone,  
E manco sempre tante, è caso raro  
Che s'azzechino in lui qualità bone.*

*Perchè s'ha da creà sempre un de loro?  
Perchè ogni tanto nun se fà filice  
Un brav'omo che attènne ar su' lavoro?*

*Mettemo caso: io sto abbottanno er vetro,  
Entra un Eminentissimo e mi dice:  
Sor Titta, à Papa lei: vienghi a San Pietro.*

Je ĉi tiu teksto itala leganto povas reagi dumaniere. Se li estas rom-dialekta parolanto, li komprenas ke temas pri roma dialekto iom arkaika sed ankoraŭ aŭskultebla en iuj urbopartoj de la buŝoj de maljunaj urbanoj. La enhavo estas por li tute bone komprenebla kun la escepto de **fornaciario** (vitrofaristo). Oni ne plu uzas la vorton, ĉar la koncerna metio ne plu ekzistas en Romo. Vitron oni fabrikas en grandaj fabrikoj en aliaj landopartoj. Kelkaj vortoj, kvankam kompreneblaj el la kunteksto, montras la arkaikecon kaj la popolecon, de la teksto. **Cazzaccio** (kac-ul-aĉo) kaj **tufo** (tofo-peco) ne plu estas uzataj en la senco de 'simplulo', 'stultulo'; **filice** (feliĉa) estas nuntempe anstataŭata de **felice**; en **attènne ar su lavoro** (li zorgas pri sia laboro) neniu uzus nuntempe **attènne**; en **abbottanno er vetro** (blow-ŝveligante vitron) la vorto **abbottanno** nun estus **gonfianno** el la literatur-itala **gonfiare** (ŝveligi).

Roma leganto krome komprenus ke en la lasta linio la altranga ekleziulo parolas (tra la buŝo de la vitrofaristo) tre humuran italan literaturan lekton, kiu estas fakte miksaĵo de la itala kaj de la roma lektoj.

Se la leganto estas italo, ne parolanto de la roma lekto, li, depende de sia klereco, povas ja rekoni ke temas pri roma dialekto (ĝi estas la ĉefurba dialekto disvastigita en la lastaj jardekoj pere de filmoj, humuraj televidaj elsendoj ktp.). Aliflanke li povas kompreni nur la ĝeneralan senco de la tuto, sed ĉiuj ceteraj informoj (arkaikeco, popoleco kaj, kompreneble, preciza signifo de multaj esprimoj) estas por li nekapteblaj. Krome, ĝenerale, li ne kapablas legi la tekston, ĉar kelkaj signoj uzataj por skribi la roman ne estas uzataj por la literatura itala (ekzemple: j, samsona kiel la esperanta j).

Kompren-problemoj, cetere, estas tre pli malgrandaj ĉi-kaze, ĉar la malproksimeco inter la roma kaj la literatura lektoj estas ne tiel granda, kiel ĉe pluraj aliaj italaj dialektoj. Se oni komparas tekstojn en kelkaj italaj lokaj lektoj kaj en la literatura itala lekto, oni apenaŭ trovas komunan vorton.

### 3.3. Pri la esperantlingva traduko

Kaj jen la traduko de Pisoni:

*Vitrofaristo, jes, vitrofaristo  
kaj malklerulo estas mi, kojono:  
sed mi rezoni povas, sen asisto,  
kun iu ajn dotita je rezono.*

*Okazas Pap-elekto el la listo  
de nur sepdek' da homoj; la propono  
ne ĉiam trafas moŝton pro l'ekzisto  
en li de ĉiuj virtoj aŭ de bono.*

*Kial elekti nur unu el ili?  
Kial ne doni ĝustan rekompencan  
al homo laboranta por utili?*

*Ekzemple: vitron blovas mi; jen frapo;  
mi vidas ĉe l'dompordo Eminencon;  
li diras: Vi, Sinjor', nun estas Papo.*

Pisoni redonas kaj la originalan ritmon kaj rimoskemon kaj preskaŭ la tutan originalan enhavon. Malgraŭ la neceso ritmi kaj rimi samtakte kiel en la originalo li kapablas trovi taŭgajn vortojn por redoni preskaŭ ĉiujn ideojn. Li estas devigita ellasi nur la tradukon de la epiteto, per kiu la vitrofaristo alparolas sian kunparolanton: **sor dottor mio caro** (mia kara sinjoro doktoro), kaj la aludon pri la fakto ke ofte la listo de la kandidatoj al papa posteno konsistas el eĉ malpli ol 'sepdek' da homoj': **e manco sempre tante** (kaj eĉ ne ĉiam tiom).

Unuvorte la traduko estas tiel perfekta, kiel traduko povas esti. Pisoni, cetere, apartenas al tiuj tradukantoj en la internacian lingvon, kiuj sentas la devon paŭsi kiel eble plej multe la originalon. Al la sama 'skolo' apartenis Kaloĉaj.

Nenio estas dirinda pri la lingvospeco uzata de Pisoni. Ĝi estas netuŝite fundamenta sen aŭdacaj neologismoj kaj sen alispecaj eksperimentoj. Nur la uzo de **kojono** en la senco de 'stultulo', kvankam eble komprenebla por okcident-eŭropanoj, povas esti rigardata kiel italaĵo.

Tamen... ĉiuj ceteraj informoj, kiujn liveras al roma aŭ itala leganto la uzata lingvospeco, restas kaŝitaj por homo, kiu komprenas nur la internacilingvan tekston. La vitrofaristo povas esti kaj pasintjarcenta metiisto kaj nuntempa laboristo en vitrofabriko. La vorto **malklerulo** povas esti same bone uzata de pastro dum solena prediko, de instruistino en knabina lernejo kaj de pia monaĥino. Ĝi tute ne estas popola-vulgara kiel la originale uzitaj vortoj. Sed ĉu en Esperanto ekzistas popolaj vulgaraj esprimoj? Similaj konsideroj estas fareblaj pri pluraj aliaj esprimoj en la tuta traduko.

Fine, estas tute superflue postuli ke tradukanto redonu la miksaĵon inter la roma kaj la literatura lektoj, per kiu parolas la 'Eminenco'. Kiel li povus? Estas interese insisti pri ĉi tiu lasta punkto. Ofte oni renkontas tekstojn, kie enŝaltado de alia lekto havas precizan signifon, kie en dialogo alterne prezentiĝas demandoj kaj respondoj en malsamaj lektoj (ekzemple kiam juĝisto pridemandas ŝteliston). Tio ne estas redonebla en Esperanto.

Ni utiligu ĉi-cele alian ekzemplon. Temas ĉi-foje pri traduko de poemo de Karlo Porta (itale: Carlo Porta), alia granda poeto verkinta en la milana dialekto. Ni ekzameniu la du centrajn strofojn de la poemo 'La Preĝo', kie milana nobela sinjorino, rakontanta pri akcidento okazinta antaŭ preĝejo kaj pri preĝo al Kristo, kaj uzanta la milanan dialekton por rakontado, ekparolas la literaturan italan lekton por la preĝo. (Preĝoj, kiel aparta kazo de alparolo al alt-rangulo, postulas pli prestiĝan lekton).

Jen la originalo (la unua strofo estas en la milana kaj la dua en la literatura itala):

*Fatta maggior de mi, subit impongo  
al mè Anselm ch'el taces, e 'l me seguiss,  
rompo la calca, passo in chiesa, giongo  
ai piedi de l'altar del Crocifiss,  
me umilio, me raccolgo, e pò a memoria  
foo al mio Signor questa giaculatoria:*

*Mio caro e buon Gesù, che per decreto  
dell'infallibil vostra volontà  
m'avete fatta nascere nel ceto  
distinto della prima nobiltà,  
mentre poteva a un minim cenno vostro  
nascere plebea, un verme vile, un monstro;*

Kaj jen la traduko de Pisoni (aperinta en *Literatura Foiro*, junio 1978):

*Do mi, pli granda ol mi mem, ordonas  
al la servisto: sekvu min, kaj ĉit!  
Mi fendas plebon, iras templon, pronas  
mi kline ĉe l'altar' de l'Krucumit',  
humilmedita al Sinjor', ripare,  
mi faras ĉi-preĝadon senprepare:*

*— Kara Jesuo bona, kiu danke  
al via senerara sankta volo  
min naskis en la klas' unuarange  
nobela pro l'distingo kaj la rolo,  
dum vi povintus nur per eta gesto  
ke iĝus mi plebano, monstro, besto;*

Ankaŭ ĉi-kaze por neitala leganto estas amaso da informoj pri la situacio, kiuj restas kaŝitaj, kvankam ĉiuj ideoj de la originalo estas preskaŭ laŭvorte redonitaj en Esperanto. Kiel diras socilingvistoj: ankaŭ la kodo estas mesaĝo, tio estas: ankaŭ la uzata lingvospeco foje enhavas en si mem komunikindajn informojn. Eĉ la plej bona Esperanto-tradukisto ne povas redoni tiun mesaĝon.

#### 4. Anstataŭ bibliografio

Interesiĝantoj pri ĉi tiuj temoj povas trovi teoriajn klarigojn pri lektoj en ĉiu enkonduka libro pri socilingvistiko. Ekzistas jam abundo da ili en multaj lingvoj, kaj pro tio ne havas sencan mencii kelkajn.

Se iu hazarde volus pliesplori la lektan situacion en Italujo, li povus eklegi A.M. Mioni, *Per una sociolinguistica italiana: Note di un non sociologo*, enkondukan eseon en J.A. Fishman, *La sociologia del linguaggio*, Officina Edizioni, Roma 1975. Tie li trovos ĉiujn necesajn indikojn pri aliaj socilingvistikaj esploroj faritaj en Italujo. La skemo prezentita en la subĉapitro 1.3. de ĉi tiu artikolo esence sekvas skemon de Mioni.

Ekzistas nur kelkaj multobligitaj aŭ tajpitaj materialoj pri sociologiaj enketoj pri la esperantlingva komunumo. Interesiĝantoj povas kontakti la Centran Oficejon de UEA, kaj peti fotokopion de la esploroj de prof. Forster pri la brita Esperanto-movado kaj de disertacio prezentita ĉe nederlanda universitato pri la itala Esperanto-movado.

Pri la interplektiĝo en Italujo inter lokaj kaj literaturaj lektoj en literaturaj verkoj oni povas komenci siajn esplorojn per G. Contini, *Letteratura dell'Italia unita: 1861-1968*, Firenze 1968.

Fine, pri la tradukoj de Pisoni el italaĵoj oni povas tralegi la jarkolektojn de *Literatura Foiro*, kiun, cetere, mi dankas pro la permeso utiligi tiujn tradukojn.

# tentaklo

KOMPUTOROJ

REAGJOJ



Krom la tentaklaj demandoj, en n-ro 66 de tiu ĉi revuo, estis ankaŭ aliaj aludetoj kaj provokoj celantaj la reag-emulojn. Unu el ili estis tute malkaŝa: en paĝo 3 oni instigis al serĉado de E-nomo por *Master Mind*. Reinhard Fössmeier el Munkeno proponis *Supercerbo*, laŭ la germana formo, kaj tio estas la sola alveninta propono. Mi do bondeziras al la nova esprimo akceptiĝon: mi mem ekuzos ĝin. Alia provoko, ĉifoje tute kaŝita, sidis en paĝo 13 (unua kolumno, 25a linio), kie Andrea diras 'je afrikaj niveloj' kun la signifo 'je malbonegaj niveloj'. Mi multe pensis dum la redaktado, ĉu mi pli bone eltondu la frazon, kiu tamen estis vere tiel eldirita en la itala. Fine mi decidis ĝin lasi, por havi iom da protest-leteroj el Afriko por aperigi. Neniu afrikano tamen ofendiĝis (oni rajtas sin demandi, ĉu iu afrikano legis: se jes, tiu bonvolu tuj sciigi!), sed venis tamen poŝtkarto el Zagrebo: 'Kion signifas tiu diabla esprimo 'je afrikaj niveloj' — hontu! Spomenka'. Neniu semo perdiĝas.

La nivelo de la artikoloj de n-ro 66 estis tre (eble eĉ tro) faka, sed mi ricevis sufiĉe grandan kvanton da reagoj kaj kontraŭargumentoj, eble ĉar ni pritraktis specifajn problemojn,

kaj ne monskalajn principarojn. En la sekvontaj alineoj mi listigos iom da tia materialo, atentigante tamen, ke la nivelo de tia debato riskas rapide ascendi for de la elteneblo de tiu ĉi revuo — aliaj ĉitemaj intervenoj aperos do nur se ili estos kompreneblaj ankaŭ de eksterelituloj.

Kris Long el Britio, celante la lastan frazon de mia artikolo (p. 5) min demandas: 'Ĉu vi neniam laboris en komputejo? Jen la taskoj de multaj: trui kartojn, disŝiri paperon, alporti bendojn....' Mi jes laboris en komputorejo, kaj kiel studento mi mem faras tiajn servojn al mia profesoro. Ne ŝajnas al mi, ke estas kontraŭdiro inter mia aserto kaj la aserto de Kris. Nur la aserto de Kris estas eble pli vera, kaj pli amara...


D-ro Bruce Sherwood, el Ilinojso (Usono), sendis tre interesan leteron, kun rimarkoj pri la artikolo de Roland Schnell (p. 8) kaj la mozaikaĵo de Péter Broczkó (p. 10). Jen lia teksto :

'Restas problemoj de ordigo de vortoj en listoj, ene de la komputilo. Ĉu la normuloj ion diris pri tio, ke se iu ekster-angla litero postsekvus z, la vortoj enhavantaj tiun literon

maltradicie ordiĝus? Ekzemple, laŭ la propono de Schnell, "ĉeno" sekvus "zebro" anstataŭ ordiĝi inter "cent" kaj "domo". Se ĉ reprezentatus per dukoda sinsekvo, de c kaj iu nombro pli alta ol z, la vortordo estus ĝusta (je kosto de pli komplika elira procedo). Tiu sistemo estas uzata en la PLATO-sistemo por perkomputila instruado, kiu estas unu el la vere malmultaj komputilaj sistemoj, kiuj permesas trakton kaj elmontron de ĉiaj alfabetoj kaj supersignoj. [Krome] mi ne konsentas pri la ofta kalkulo, ripetita de Péter Broczkó, ke pontlingvo ege simpligus tradukajn programarojn.... Uzo de pontlingvo tute ne liberigus nin de la bezono transformi la originan frazon en abstraktan reprezenton, kio estas la ŝlosile malfacila tasko.... Krome, [tiu pontlingvaĵo] devus esti tre rigore limigita, maŝineca, ia kreata 'baza Esperanto' por ne enkonduki pliajn tradukajn erarojn. Se la pontlingvo devus esti tiel strikte limigita, ĝi povus esti 'baza angla', kiu diversforme jam ekzistas. Ĉi tiuj kontraŭargumentoj facile elpensiĝas, do ni riskas mokojn per nia foja pledo por ĉi tia uzo de Esperanto. Pli bone ni emfazas, ke **homa** uzo de Esperanto povus senbezoni maŝinan tradukadon!'

Ankaŭ la jam menciita Reinhard Fössmeier tuŝas tiun punkton: 'Kun iom da miro' — li skribas — 'mi rimarkis, ke plurloke en la kalendaro menciatas tradukprogramoj por homaj lingvoj, kvazaŭ ili estus ĉiutagaĵo... Profesoro pri lingvistiko antaŭ nelonge diris al mi, ke laŭ li ne ekzistas seriozaj projektoj en tiu kampo, [kaj eksplicite aldonis] ke la avantaĝoj de planlingvoj en tio estas neglektindaj.'

Ni parolu nun pri *Tentaklo* en si mem; eble ĉar la temo estis komputoroj, ĉiuj tentaklintoj tre skrupule respondis ĉiujn demandojn, kvazaŭ






<p>Tra la Movado regas interna milito. En la koridoroj de niaj kongresejoj publike batalas la armeoj de TESTUDO kaj TETASO. Ĉio tio pro</p> <p><b>LA TERURA TENTAKLO!</b></p> <p>LASTA PARTO</p>	<p>Teorioj pri la origino de la tentaklo fariĝis pli fantaziaj</p> <p>Jes, posedas la tentaklon sekreta organizo, LUPO:- Lingvaj Universalistojn Pereigu Ofensive.</p> <p><b>Ĉu ne plu kulpas ORE?</b></p> <p>Jes, ja. LUPO estas subfako de ORE. La plena nomo estas:- Ornitologia Rondo Esperantista - Lupa Operacio. Mallonge, ORELO.</p>	<p>Necesas kontraŭbatali ORELOn. Kiel? Leviĝis du tendencoj, unu pacama, la alia batalema. Por uzi la terminologion de ORE, la akcipitroj kaj la kolomboj.</p> <p><b>ALIĜU AL RATO!</b> Ruza Amikemo Trompos ORELOn</p> <p><b>Lanĉigas KATO!</b> Kolosa Atako Traŭmatizos ORELOn</p> <p><b>MEVO Organo de ORE</b> eks-kolombo</p> <p>Kia rezulto! RATO estis ĉasata de KATO; la akcipitroj manĝis la kolombojn. Stariĝis aliancoj strangaj (TESTUDO kun LUPO) kaj memkompreneblaj (TETASO kun ORELO).</p>	<p>Sufiĉas! La elasto de mia pacienco ĵus kreviĝis! Kiu kapablos paciigi ilin?</p> <p><b>Mi parolos al la kverelantoj! Ili atentos min!</b></p> <p>Ĉu vi estas lerta oratoro?</p> <p><b>Certe! Iam mi parolis antaŭ 50 000 personoj!</b></p> <p>Ĉu vere? Kion vi diris?</p> <p><b>"Araĥidoj, glaciaĵoj, bombonoj!"</b></p>	
<p>Daŭris la kaoso:</p> <p><b>Baldaŭ restos nur kelkaj esperantistoj. Ili fariĝos raraj kaj valoraj!</b></p> <p>Kiel malnovaj poŝtmarkoj! Precize! Aliĝu do al KORPO - Kaperu Ostempe Rarajn Personojn Ostaĝige. La aliĝkoto estas nur <math>g/\sqrt{1,720-0,12(n-1)/365}</math> steloj!</p> <p>KORPO enspezis milionojn da steloj, kaj neniu suspektis, ke tiu mono versiĝis al ORELO. Mirinde, ĉar ĉiu scias, ke ORELO estas organo de KORPO!</p>	<p>Sufiĉe ni esploris pri ORE. Nun la vico de la nudistoj, kaj iliaj organoj. Jen unu, kiu saltas el bankuvo...</p> <p><b>Eŭropa! Mi trovis la solvon!</b></p> <p>"Eŭropa"? Ĉu li ne volis diri "Eŭreka"?</p> <p>Lia kono de la greka estas tre limigita!</p>	<p><b>Kiun solvon vi trovis?</b></p> <p>Mi scias kial la tentaklo atakas! Du horojn mi meditis kaj finfine mi...aaaA!</p> <p>Tiel okazis, ke la unuaj 325 malkovrintoj de la sekreto estis fortentaklitaj antaŭ ol ili povis klarigi la misteron al iu alia.</p> <p>Eŭripedes, finfine... Eŭroŝento, finfine... Eŭrocentrismo, finfine... Eŭrobekoj, finfine...</p>	<p>La 326a sukcesis! Tiu eklernas Esperanton jam dum dek jaroj, kaj atingis nur la duan lecionon. Li lernis "komenci" kaj "mal-" sed ankoraŭ ne "fini".</p> <p><b>Vi ne rajtas diri "malkomenci"!</b></p> <p>Jes!!! La tentaklo atakas direktantojn de "fin". Savis la tutan movadon eterna komencanto!</p>	
<p>Jes, jen la solvo, kiun neniu skribe komunikis al la redakcio! TEJO ne baldaŭ anticipu aliĝpeton de DEMI:- Detektiva Esperantista Movado Internacia. Rigardu tra la jarkolekto. La homoj malaperis post eldiro de: trafinte, finnan, difinu, Finnlando, Financo, bafinde, ĝirafino, fingromontras, finna, Fina, fingro, Finta kaj finfine.</p> <p>Krome, tentaklo atakis la afiŝon de la ĉina/japana urbo Qwari en Parto Du. Kial? Ĉar tiu ideogramo signifas 'fino'! Vidu, ni ne ignoras niajn aziajn legantojn! Ni ne atendu lanĉon de DEMJ aŭ MEĈD - la ĉina kaj japana sekcioj de DEMI.</p>	<p>Kiel nun kapti la tentaklon? En kiu lando ĝi troviĝas?</p> <p>- Fin-lando, kompreneble. Misaplikante la oran regulon "Ne forgesu la akuzativo!" ni akuzas ne fin-landon sed Finnlandon. Ekspedo de la tentaklo-trovaj taĉmentoj pruviĝis pli malfacila ol oni supozus:</p> <p><b>Du biletoj al Finnlando, mi p...aaaaAA!</b> Kvarcent guldenoj!</p> <p><b>BILETOJ</b></p>	<p>Eĉ per ruzado la afero ne ĉiam sukcesis:</p> <p><b>Du biletoj al la norda lando, tiu de la nokto-meza suno, kun saŭnoj...</b></p> <p>Do, al Finnlando! 500 guldenoj*, mi aaaAA!!</p> <p><b>BILETOJ</b></p> <p>*Altiĝis je 100gld. en 2 sekundoj pro revalorigo de la finna marko!</p>	<p>Post fortentakligo de 427 bileto-vendistoj kaj 324 taĉmentanoj, du bravuloj esploris la estintan kongresejon:</p> <p>40 mil malplenaj laktoskatoloj, tri kreviĝintaj komitatanoj, 20 katalunaj kantlibroj, nenio suspektema ĝis nun!</p> <p>Vidu! Amaso da punto! Punto-bunto!</p> <p><b>Ne tuŝu la tentaklaĵojn!</b></p>	<p><b>JEN!</b> 24 mil tunoj da postlasita punto, kiu fortentaklis X milionojn da esperantistoj, al la plej granda saŭno de la mondo!</p> <p>Armitaj per nur la morala memfido kiun oni akiras per ĉiutaga legado de la Statuto de TEJO, la du bravuloj superis la pinton kaj liberigis ĉiun. Ilija famo, kiel tiu de Esperanto, radiis tra la mondo. Tiel nia rakonto venis al feliĉa kaj sukcesa f... f.... ha, tamen eblas diri ĝin... al sukcesa <b>fino!</b></p>

Desegni: H. den Draak kaj

iliaj verkaĵoj estus analizotaj komputore. Kris Long eĉ verkis per globkrajono sur komputora papero. Vi tamen ne bezonas komputoron por rilatigi la ĉisubajn respondarojn al la koncernaj demandoj en paĝo 14 de n-ro 66. Jen do:

1 La plejparto de la respondintoj profesie laboras per aŭ ĉe komputoroj, do reprezente de ili mi citu la respondon de Kris Long, ke ĉiprie li scias 'tro por skribi ĉion!' Reinhard Fössmeier opinias, ke 'la amaskomunikila informo pri komputoroj estas nesufiĉa, sed apenaŭ intence malobjektiva. Foja malobjektiveco ofte venas de manka scio de la informverkindo'. Siaflanke Kris Long pri tio deklaras: 'Amaskomunikiloj apartenas al epoko, kiam kleruloj nenion



sciis pri scienco.' El Usono raportas Marko Vedelo, Florida, ke 'ne plu oni legas (kiel en la 50aj kaj fruaj 60aj jaroj) pri la "minacaj maŝinoj kiuj superregos la mondon", tio estas ja fantazio kaj ĉiuj tion scias.' Fine Normand Fleury, Kebekio, redaktorkuraĝige skribas: 'Mi ne multon scias pri komputoroj, ĉar mi neniam studis ilin ... sed, dank'al *Kontakto*, mi nun scias pli multe pri ili.'

2 Plej pesimisme respondis Normand Fleury: 'La televido ne instruas kaj la programoj estas ofte senvaloraj' (veteranoj! por tio vi vin turnu al *Kontakto*, n-ro 55). Plej optimisme Marko Vedelo: 'En Usono ... oni povas informiĝi pri kiu ajn scienca fako senprobleme kaj malmultekoste.'

**3** Ĉifoje Kris Long radikalas: 'Ne! ... Laŭ mi "scienco" ĝenerale entute estas iluzio de ne-sciencistoj: vere ekzistas nur fakoj.' Marko Vedelo opinias, ke *Kontakto* ne estas la plej bona forumo por sciencaj temoj, krom se ili rilatas aktualajn problemojn. Li krome timas, ke certe ne estus taŭga 'la aperigo de numero pri la osmoza procezo de ĉeloj, aŭ io simila', pri kio la redaktoro plene konsentas.

**4** Pri la unua subdemando plej science respondis Reinhard Fössmeier: 'Certe la **eblecoj** okupiĝi pri scienco ligiĝas al la socia pozicio. La **intereso** tamen eble ne, kaj certe ne nepre la **kapabloj** (laŭ miaj spertoj).' La duan subdemandon plej poezie (laŭ miaj sentoj) respondis Kris Long per la ununura tajpero '?'.  
**5** Normand Fleury: 'Mi ne multe komentos ĉar la asertoj estas veraj.' Marko Vedelo: 'Laŭ mi [la unua] aserto estas iom absurda. Iu ekzistanta grupo povas utiligi komputorojn por kiu ajn celo. La tropovo de polico pro la uzo de komputiloj estas ja alia afero. La komputiloj tamen nun rapidigas la laboron de polico, tre utile por malaltigi la ĉiam kreskantan krimnivelon.' Reinhard Fössmeier: 'Por mi kiel ideologia laiko estas tute klare, ke la maŝino ne estas malbona; se ĝi povus esti tia, oni ja povus forigi ĝin (en bona socio).'

**6** Pri tiu ĉi demando kelkaj respondintoj ĝenerale dubis, ĉu ili bone komprenas la vorton 'informadiko', kaj ĉu oni parolas pri **praktikaj** aŭ **potencialaj** eblecoj. Ĉirilate oni povus sintezi, ke potencie la eblecoj estas optimumaj, praktike ne tre grandiozaj, kaj ke (Fössmeier) 'ja ne la komputoroj, sed la komputoristoj parolas

(preskaŭ) nur la anglan.'

**7** Marko Vedelo, samlandano de IBM, memorigas, ke ĝi 'estas giganta korporacio kiu respondecas al la multnombraj akciodoj kiuj ĝin konsistigas. Do ĝi ja devas profiti de siaj agadoj. Sed kial estas la profito malbona? Sen profitcelaj organizaĵoj la nuntempa mondo kiel ni ĝin konas ne ekzistus. Kaj sen la rezulto de tiuj grandegaj organizaĵoj nia vivo certe estus pli malriĉa.' Laŭ Reinhard Fössmeier ekzistas 'precipe influo de komputorado al lingva imperiismo', dum 'la influon alidirektan (imperisma politiko — informadiko) [li] kredas ne pli granda ol en multaj aliaj branĉoj.' La tuton finu la konstato de Kris Long, ke 'eĉ el Sovetio [li] ricevis komput-presaĵon en la IBMa.'

**8** Plej mallonge Kris Long por ĉiuj: 'Ĝuste: kial ne?'

**9** Marko Vedelo: 'La temoŝanĝo indikas al mi, ke la redakcio de *Kontakto* klopodas variigi la temojn por kapti la intereson de ĉiuj legantoj. Bona ideo.' Reinhard Fössmeier: 'Eĉ post meditado, tio sugestas nenion al mi. La legantaro de *Kontakto* estas bonŝance pli praktika, ol oni foje supozas. Bona signo.'

**10** Normand Fleury: 'Mi ne pensas, ke timo estas stulta sinteno, kvankam mi mem ne timas. Eble oni timas ĉar kutime oni ne estas sufiĉe informata.' Marko Vedelo: 'Timo pro komputiloj? Ne nur stulta, sed absurda!' Reinhard Fössmeier: 'Mi mem ne timas pro komputoroj, eble ĉar mia profesio ne estas minacata, sed ebligata de komputoroj. ... Kiam ies laborposteno estas minacata de komputorigo, li devas timi pro tio, alie li ne klopodus pri kompenso (eble reinstruiĝo por nova profesio).'



**11** Ĝenerale ĉiuj respondintoj posedas poŝkomputoron aŭ poŝkalkulilon kaj en iliaj landoj tiu varo estas populara. De tio oni facile povas dedukti, ke ne venis respondoj el ekster Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Tia dedukto estus tute prava.

**Fina Lingva Rimarko:** Traktante tiun temon, la redakcio decidis ne adopti 'propran' formon por la fama vorto komp(j)ut(ator/er/il/or/r)o, sed lasi al ĉiu unuopa aŭtoro mem elektis sian preferatan formon. Tiel la sama aparato estis nomita en tri diferencaj manieroj en unu sama paĝo. Mia persona uzo sekvas la jenan skemon:

**komputoro:** programebla datumellaboranta aparato.

**kalkulilo:** ne-programebla aparato por algebraj operacioj ks.

**komputilo:** aparato registranta la fluon aŭ la ripetiĝon de iu substanco aŭ evento.

**mezurilo:** laborilo por taksi kaj difini fizikajn grandojn.

Kvankam ŝajnas al mi absolute nepre lasi 'komputi' ĉe ĝia PIVa signifo, ĉar mi ne vidas aliajn eblecojn anstataŭigi ĝin krom per neologismo ĝis nun ne ekzistanta, mi timas, ke ĝuste tia kaza situacio speguliĝinta en nia revuo pli kaj pli forgesigas al la parolantoj la distingon inter 'komputi' kaj 'komputori', malebligante la konserviĝon de la ĝisnuna signifo de 'komputi' kaj fine 'venkigante' ĉi lastan kontraŭ 'komputori'. Kaj do?



Sur paĝo 19 aperas bildo de komputilo

aparato registranta la fluon aŭ la ripetiĝon de iu substanco aŭ evento.

Atentu la mesaĝon, kiun vi povos legi en tiu komputilo, kaj senprokraste realiĝu al TEJO aŭ renovigu vian abonon al "Kontakto" por 1981!

# Libera Tribuno

Reage al miaj klopodoj en la enkonduko de Kto 66, alvenis du coloj (vertikale) da interesaj leteroj de legantoj. Tio estis kuraĝiga: Ni esperu, ke la nuntempa poŝtafluo ne interrompiĝos! Pluraj el la ĉisube aperantaj elĉerpaĵoj levas demandojn, kiujn oni diskutis iomete en la rondo de konstantaj kunlaborantoj — estas nun konvene, ke en tiu ĉi rubriko la debato pluu. db

&&& &&&

Mi legas *Kontakton* por plilerni la lingvon. Mi ĉiam havas vortaron apude kiam mi ĝin legas, sed kelkfoje mi ne bone komprenas la uzitajn vortojn. La lingvaĵo de *Kontakto* estas malfacila, sed ne povus esti alimaniere, ĉar la artikoloj pritraktas malfacilajn temojn. *Kontakto* estu serioza revuo, ne supraĵa babilaĵo!! Mi do ŝatas la revuon tia, kia ĝi estas nun. Plaĉas al mi la ideo de unu ĉefa temo por unu tuta numero.

Normand Fleury, Kebekio

&&& &&&

Mi ne kompetentas pri komputoroj kaj informadiko, kaj tial n-ro 66 estis por mi iom teda. Mi konsilas por la estonteco elekti malpli fakajn temojn, interesajn por pli da homoj...

Mauro Nervi, Italio

&&& &&&

Gratulojn pro via bonega prikomputa numero! Apartajn laŭdojn por la lerta pruvo, verkita por nefakuloj, ke la nuntempaj komputiloj ne 'pensas', kaj por la bona resumo de Rudolf Fischer pri diversaj aspektoj de komputila trakto de Esperanto.

Bruce Arne Sherwood, Usono

&&& &&&

Ŝajnas al mi, ke *Kontakto* (kiel la TEJO-paĝo en *Esperanto*) preteratenas la movadojn en Usono kaj Kanado.

Mi ja komprenas, ke ne estas vigla organizaĵo en niaj landoj, sed ĉu TEJO ĝuste pro tio ne devus pli bone kaj tre zorge flegi la gejunulojn ĉitiejajn? Interalie mi volas gratuli TEJOn pro la elekto de Oaxtepec kiel loko por la venontjara IJK. Mi certe estos tie. Ĝi estos mia unua internacia E-renkontiĝo. Mi precipe volas gratuli pri la loko mem, Oaxtepec. Pli belan lokon en Meksikio estus malfacile trovi. Apud vilaĝeto en la ŝtato Morelos, ĝi estas vera tropika paradizo. Kun modernaj konstruaĵoj kaj naĝejo de Olimpia amplekso, ĝi estos tre taŭga kongresejo.

Marko Vedelo, Usono

&&& &&&

Dum la junularaj debatoj de la UK levigis la demando: anstataŭ havi ĉiam temojn kiel 'komputoroj', 'alternativaj vivstiloj' ktp., ĉu oni povus foje havi temon en formo de demando ('Ĉu la neŭtraleco de TEJO helpas aŭ malhelpas ĝin?', sed ankaŭ 'Ĉu UN povas fariĝi vera monda registaro?'), kaj aperigi jesajn kaj neajn artikolojn rilate la demandon?

Yves Bellefeuille, Kanado

&&& &&&

La AKADEMIO de Esperanto notas kun forta malaprobado diversajn proponojn, inter si malsimilajn, enkonduki fremdajn elementojn en la interpunkcion de Esperanto. Aparte danĝera estas la t.n. 'ampersando', speco de misformita oko, kiu minacas anstataŭi la aŭtoŝtone aŭtentikan mallongigon por 'kaj', tiel malpurigante nian karan lingvon.

Asocio de Ksenofobiaj Atakantoj de Devioj de la Efektiva Malreformisma Interpunkcio kaj Ortografio de Esperanto (AKADEMIO de Esperanto)

k k k k k k

## La PASPORTA SERVO de TEJO anoncas 50%an rabaton por TEJO-membroj!

Ekde 1981, individuaj membroj de TEJO rajtos ricevi 50%an rabaton je aliĝo al la plej populara servo de la Organizo: la Pasporta Servo.

Kune kun *Kontakto* 1981:1 (69), ĉiu individua membro de TEJO/UEA por 1981 ricevos kuponon kiu, kune kun la rabatita kotizo, pagos membrecon en la Pasporta Servo. Tiu numero aperos en marto, do aliĝemuloj bridu intertempe sian entuziasmon. La normala kotizo (inkluzive la prezon de la libreto *Listo de gastigantoj*, kies nova eldono aperos en februaro) estas 18 francaj frankoj (=9 irpk.=9 gld.). Sed sendante la kuponon, TEJOano rajtos aliĝi kontraŭ 9 francaj frankoj (=5 irpk.=4,50 gld.).

La Servo proponas jam nun 360 lokojn en 48 landoj, kie aliĝintoj povas senpage tranokti. Do ne prokrastu — aliĝu al la Servo en marto kaj planu viajn vojaĝojn por 1981!

Bonvolu noti, ke la tempo pasas for, pli rapide ol vi rimarkas,

ke jam venas

j  
a  
r  
f  
i  
n  
o

kaj pasis — estas jam

la tempo, kiam

ne necesas realiĝi al TEJO


aŭ reaboni *Kontakton*. *Kontakto* 1981:1 (69) iros nur al pagintoj. Do, se vi volas ĝin freŝe, necesas kotizi ĝustatempe! Se vi volas ĝui la rabaton por la Pasporta Servo, necesas kotizi jam nun. Petu la vialandan tarifon por abono aŭ membreco de via UEA-peranto, aŭ rigardu la tabelon en *Esperanto*, 1980 okt. (p. 179).



FREMURA

# Ne kredis

ke la unua (plej favortarifa) aliĝperiodo de la 37a IJK (Oaxtepec, Meksikio, 1981 07 10-17) forpasis fine de decembro. Ne estas tiel — eĉ se tiaj informoj aperas sur la ĉi-kuna aliĝilo. Kontraŭe, laŭ speciala fulmrapida decido de la Estraro de TEJO (tiel fulmrapida, ke iuj estraranoj eble ankoraŭ ne konscias, ke ili faris ĝin), la unua periodo estas longigita ĝis la fino de januaro 1981. Do rapidu! Oaxtepec estos unike hela kaj bela IJK-urbo, la unua en Ameriko. Pro sia mirinda situo, meze de montoj, valoj, vulkanoj kaj antaŭkolumbaj arĥeologiaj restaĵoj, kaj pro siaj abundaj sulfurakvaj fontoj, Oaxtepec estas inter la plej allogaj feriejoj sur la kontinento. Ne maltrafu ĝin!



## INTERNACIA JUNULARA KONGRESO



Pri vojaĝado al Oaxtepec el Eŭropo, ne eblas multon definitivajn raportojn, ĉar la flugtarifoj ŝanĝiĝas. El Amsterdamo, tute nerabatita rondvojaĝo (kun alteriĝo en Meksiko, ĉ. 80 km. for de la kongresurbo) nuntempe kostas malpli ol 2000 guldenojn, sed ekzistas ankoraŭ multe malpli kostaj flugoj, ekz. el Bruselo (ĉ. 1000 gld.) kaj el Londono (ĉ. 1400 gld.). Ni esperas aperigi pli da detaloj en venonta numero de 'Koncize'.

MEKSIKIO-1981